

BULGARA **ESPERANTISTO**

ORGANO DE BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO

En la numero:

-
- MEMORLOKOJ
DE NEVELKANTA
GLORO
-
- POR JUBILEA
KUNLABORADO
-
- BULGARAJ
VIRINOJ EN LA
E-MOVADO
-
- NIAJ
VETERANOJ
-
- EN SERVO DE
ESPERANTO
KAJ MELPOMENO
-
- ELDONAGADO
DE BEA
-
- ESPERANTISTA
HELPO



JARO 36 • N-RO 3 • MARTO • 87

MEMORLOKOJ DE NEVELKANTA GLORO



La fama rusa generalo M.D. Skobelev

En la memoro de la bulgara popolo eterne vivos la heroaĵo de la rusaj soldatoj — liberigintoj de Bulgario elsub la kvinjarcenta otomana jugo.

En la bulgara tero ripozas la ostoj de miloj da soldatoj — rusoj, rumanoj, bulgaroj — pereintaj dum la Rusa-Turka Milito en 1877/1878. Neniam velkos ilia gloro! La danka bulgara popolo sanktigis la lokojn de la plej kruelaj sangoversaj bataloj per monumentoj, preĝejoj kaj muzeoj, kiuj memorigas al la generacioj pri tiu plej grava historia momento.

La batalo por urbo Pleven estas unu el la plej gravaj strategiaj operacioj en la Rusa-Turka Milito. Post multaj kruelaj atakoj kontraŭ la turkaj bastionoj, dum kiuj pereis miloj da bravaj soldatoj; post kelkmonata sieĝo de la urbo, sub la gvidado de generalo Tottleben, Pleven falis. Pli ol 40 mil militkaptitoj kaj sen nombraj milittrofeoj estis la rezulto de tiu venko, kiu decidis la pluan sorton de la milito kaj la liberigon de Bulgario.

La kaptita komandanto de la turkaj milittrupoj en Pleven Osman-paŝao persone transdonis sian sabron al caro Aleksandro II. Kiel esprimo de estimo al la venkita turka militestro, la rusa caro redonis la sabron al Osman-paŝao, kiu prononcis la historiajn vortojn: „Via Imperiestra Moŝto, la milito estas finita!...“

Sed la milito ne estis ankoraŭ finiĝinta.

Pleven estis nur la decida turnopunkto. Restis tamen por ĉiam en la memoro de la generacioj la nomoj „Volo de la morto“, Gorni Dăbnik, Grivica. . . Oni ne povas esti en Pleven kaj ne viziti la Maŭzoleon de la pereintaj rusaj kaj rumanaĵ soldatoj, la parkojn-muzeojn „Skobelev“ kaj „Lavrov“, La Centran Urban Historian Muzeon, la domon-muzeon de Aleksandro II „Liberigo — 1877/1878“, la Panoramon de la bataloj kaj multajn ali-

ajn sanktajn por bulgaroj kaj rusoj lokojn — por kiliĝi antaŭ la memoro de la herooj.

Pasintsomere, feriante proksime de urbo Pordim (30 kilometrojn nordoriente de Pleven), mi ne povis preterlasi la okazon viziti du lokojn ligitajn kun la historiaj eventoj dum la Rusa-Turka Liberiga Milito (1877/1878). Versajne malmultaj scias, ke de la 26-a de oktobro ĝis la 15-a de decembro 1877 en Pordim troviĝis la Ĉefstabo de la rusa kaj rumana armeo, lokitaj en du apartaj domoj. Laŭ iniciato de la fama bulgara revoluciulo kaj sociaganto Stojan Zaimov el Pleven (patro de la generalo-antifaŝisto Vladimir Zaimov), la 3-an de septembro 1907, en ĉeesto de generalo Stoletov — ekskomandanto de la bulgaraj volontuloj dum la liberiga milito, ambaŭ domoj estis oficiale inaŭguritaj kiel domoj-muzeoj de la rusa-rumana-bulgara batalmikeco.

La domo, en kiu estis la Ĉefstabejo de la rusa armeo, ĉe-kape kun caro Aleksandro II kaj la Granda Princo Nikolaj Nikolajevič, apartenis al Ivan Stojkov, al kiu la caro donacis sian oran ringon kun monogramo — kiel dankesprimon pro lia gastamo. En tiu domo, post la falo de Pleven, kunsidis la Supera Militkonsilantaro, kiu decidis la vintran traŭnon de la Balkan-montaro. Tie ĉi grafo Ignatiev raportis la projekton de la pac-kontrakto kun Turkio, kiu estis pridiskutita, aprobita kaj post la finiĝo de la milito, la 3-an de marto 1878, subskribita en San-Stefano.

En la apartaj ĉambroj de tiu unuetaĝa domo nun estas aranĝitaj vitrinoj kun diversaj eksponaĵoj: rusaj, rumanaĵ, bulgaraj, kaj turkaj uniformoj kaj armilaro; ordenoj kaj medaloj, per kiuj estis dekoritaj, pro ilia braveco, bulgaraj volontuloj; multaj dokumentoj, fotoj kaj faksimiloj de ordonoj kaj dekretoj. Unu el la ĉambroj prezentas la dormoĉambron de la Granda Princo Nikolaj Nikolajevič, en kiu troviĝas lia aŭtentika transportebla lito kaj aliaj personaj akcesoraĵoj. En la ĉambro, en kiu okazis la kunsido de la Supera Militkonsilantaro, sur unu el la muroj pendas granda oleopentraĵo, verko de Saŝo Raĉev el Pleven, prezentanta kunsidon de la Militkonsilantaro. En apartaj vitrinoj estas aranĝitaj manuskriptoj de la militkorespondantoj V. I. Nemiroviĉ-Danĉenko (ruso), Januarius MacGahan (usonano), k.a. Ĉi tie estas ankaŭ materialoj de la Medicina-Sanitara Konsilantaro, en kiu partoprenis la fama rusa kuracisto-hirurgo Pirogov. En la korto de la domo, kiu nun prezentas bonege aranĝitan kaj prizorgatan parkon, oni povas vidi diversspecajn kanonojn, per kiuj estis armita la liberiga rusa armeo.

En proksimeco, preskaŭ vid-al-vide estas la domo-muzeo „Rumana soldato“, tiam posedaĵo de la loĝanto de Pordim Vârban Iliev, en kiu estis lokita la ĉefstabo de la rumana helparmeo sub la komando de generalo Aleksandru Cernat. Ankaŭ en tiu domo estas aranĝita ekspozicio, kiu montras la rumanan partoprenon en la milito: soldataĵ kaj diversrangaj oficiraj uniformoj, armilaro, dokumentoj kaj fotoj, objektoj el la ĉiutaga vivo de la soldatoj k. a. En apuda dometo estas restarigita la dormoĉambro de princo Karol I kun originalaj eksponaĵoj. La tuta ekspozicio, per ciferoj kaj aliaj donitaĵoj montras la grandan helpon de la juna tiutempe rumana armeo por la liberigo de Bulgario.

En la proksima al Pleven vilaĝo Grivica estas multaj memorlokoj omaĝe al la heroe pereintaj en la liberiga Rusa-Turka Milito rumanaĵ soldatoj.

Memorlokoj de nevelkanta gloro, de profunda popola dankemo al la liberigintoj de Bulgario! . .

*Pordim-Sofio,
marto, 1987*

Dončo RITROV



NI INTERLIGU LA MANOJN POR JUBILEA KUNLABORADO

D-ro Humphrey TONKIN,
prezidanto de UEA

La Jubilea Jaro longe atendata nun staras antaŭ ni: Esperanto farigas centjara. Ke ĝi plene maturiĝis, tio estas evidenta jam delonge. Ne plu oni povas nomi Esperanton interesa eksperimento; ne plu oni povas priskribi nian lingvon kiel ambician provon al internacia kompreniĝo. Hodiaŭ Esperanto jam pruvis sian taŭgecon en ĉiuj medioj, kaj estas nenio tro komplika, nenio tro subtila — se entute ĝi estas lingve esprimebla — kio ne povus esti esprimata en la Internacia Lingvo. Kiel lingvo, Esperanto plene sukcesis.

Ankoraŭ ne plene sukcesa estas la disvastigo de tiu lingve sukcesa fenomeno. La granda plimulto de la homaro neniam aŭdis pri Esperanto. Inter tiuj, kiuj scias, kio ĝi estas, ekzistas multaj homoj, kiuj ne plene komprenas ĝian grandan kapablon aŭ dubas pri la asertoj kaj pretendoj de tiuj, kiuj konas ĝin pli bone. Necesas dum la Jubilea Jaro atingi tiujn homojn, kiuj nenion scias pri Esperanto, kaj konvinki ilin lerni la lingvon. Necesas atingi la skeptikulojn por forigi ilian skeptikecon. Necesas, entute, sukcesigi ne nur la lingvon, sed ankaŭ la movadon por disvastigi tiun lingvon.

Okazoj tiel bonaj kiel la Jubileo ja venas malofte: necesas, ke ĉiu parolanto kaj uzanto de Esperanto streĉu sin ĝis maksimumo dum la Jubilea Jaro. Kion ni povas fari?

● Unue, ni povas instrui la lingvon, ekzemple per starigo de loka kurso, aŭ ni povas helpi aliajn tion fari.

● Due, ni povas verki artikolon aŭ artikolo-

lojn pri la lingvo kaj proponi ilin al loka aŭ nacia ĵurnalo aŭ gazeto.

● Trie, ni povas atentigi niajn amikojn kaj kolegojn pri Esperanto kaj ĝiaj atingoj, kaj klopodi konvinki ilin esplori ĝin pli profunde.

● Kvare, ni povas kunlabori en alia agado, loka aŭ nacia, por informi la publikon pri Esperanto.

● Kvine, ni povas subteni la Esperanto-movadon per aĉeto de libroj, per partopreno en kongresoj kaj konferencoj, kaj per financaj kontribuoj al lokaj, naciaj aŭ internaciaj Esperanto-organizaĵoj.

Efika informado pri Esperanto postulas efikan informiĝon: ni devas mem koni nian lingvon kaj nian movadon. Necesas prezenti la faktojn, klare kaj sen troigo aŭ subtakso. Necesas zorgi kaj saĝe esprimi la argumentojn por Esperanto. Do, la unua neceso, se ni volas klerigi la publikon, estas klerigi nin mem. Kaj kiam ni elpaŝos por montri Esperanton al la publiko, ni povas apogi nin sur la jamaj atingoj de la Esperanto-movado, sur la rekono, kiun ĝi jam ricevis ĉe Unesko kaj aliaj internaciaj organizaĵoj, kaj sur la personaj spertoj de miloj da esperantistoj, kiuj profitis spirite, kulture, intelekto el sia utiligo de la Internacia Lingvo.

Fine, se ni deziras, ke nia lingvo de la paco efektive kreu pli pacan mondon, ni devas mem praktiki la pacon: nia lingvo plej rapide progresos, se ni harmonie kunlaboros inter ni, kaj ĉiuj ligoj inter si la manojn por komuna agado en la Jubilea Jaro.

LA BULGARAJ ESPERANTISTINOJ VIGLE AGADAS

Komenciĝis la festa jubilea jaro: cent jarojn lingvo Esperanto, okdek jarojn Bulgara Esperantista Asocio. Proksimiĝas la Internacia Tago de la Virino — Oka de Marto.

En niaj festparoladoj ni turnas rigardon al la pasinteco, por menci la nomojn de la unuaj esperantistinoj, komencintaj ellerni la internacian lingvon, agintaj por informi pri Esperanto: en 1902 Rajna Nikolova, Cvetana Silvestrieva; la instruistinoj Careva Dobрева kaj Stojanka Rađeva el Ŝumen en 1904. En la nova societo „Fulmo“, 1899, membras Anastasia Vâlceva. En Sofio, 1912, dum la „Verda semajno“ prelegas pri Esperanto Lidia Ŝiŝmanova. De tiu ĉi tempo datumas la renkontiĝo kun Esperanto de Zora Hans el Varna, unu el la estimindaj E-veteraninoj.

La politikaj eventoj el 1923/25 bremsas la junan E-movadon en nia lando. Tamen en la medioj de la progresemaj junuloj la lernado de la lingvo daŭras. Aperas la nomoj de la sindonaj aktivulinoj Tinka Lakova, Trajana Petkova, Bogdana Popova. Kune kun siaj kamaradoj ili zorgas pri eldonado kaj disvastigado de E-gazetoj, aktive korespondas kun esperantistoj el USSR, deklamas, kantas ĉe kunvenoj.

Post la jaro 1940 la lingvon Esperanto oni instruas en malliberejoj, en koncentrejoj. Iuj el la heroinoj-esperantistinoj lasis siajn nomojn en la panteono de la senmortaj: Vela Piskova, Mara Taseva, Anka Kamburova, Vela Peeva, Penka Miĥajlova, Roza Herŝkoviĉ k.a. Kiel esprimo de nia adoro al ilia heroaĵo, iuj E-societoj hodiaŭ havas ilin kiel siajn patronojn kaj ilia kontraŭfaŝista agado estas temo de multaj prelegoj.

Tuj post la venka tago 9-a de Septembro, 1944, membroj de la Centra Komitato de BEA estiĝis virinoj, gvidajn organizaĵajn kaj kulturajn postenojn okupis virinoj. Unu post alia venas novaj generacioj, kiuj alprenas la flamon, la entuziasmon de la pli aĝaj, por poste siavice transdoni la stafeton.

Trajana Petkova, travivinta la kruelaĵojn de la faŝista teroro, nun distingita per la ŝtata titolo „Heroo de socialisma laboro“, ligis sian socian aktivadon en la bulgara virina movado kun la esperantista — ŝi fondis virinan komisionon ĉe BEA, starigis bonajn ligojn kun la Komitato de la Bulgaraj Virinoj tiel, ke nun — post dudek jaroj, kiel honora prezidantino de tiu ĉi komisiono, ŝi rajtas ĝoji pri la rezulton agado de siaj pli junaj amikinoj. La nunna Virina Komisiono ĉe BEA, kun siaj kunlaborantinoj-aktivulinoj el ĉiuj distriktoj E-societoj, povas raportoj pri aktiva kunagado kun neesperantista virina organi-

zo — la Komitato de la Movado de Bulgaraj Virinoj, pri eldono de la plej aŭtoritata en la E-medioj virina revuo „Bulgarino“; pri ĉiujaraj konferencoj, dum kiuj la esperantistinoj raportas pri aktiva diversflanka agado en kunlaboro kun la Komitatoj de Patrolanda Fronto, de sciencaj kaj virinaj sekcioj, de kulturdomoj kaj legejoj, de redakcioj. Nia Virina Komisiono estiĝis patrono de E-societo „Cvjetko Radojnov“ en urbo Grudovo (en la Respubliko de la juneco „Stranĝa-Sakar“).

Tinka Lakova, estimata veteranino, partoprenis la MEM-konferencojn jam en la unuaj jaroj de ĝia agado. Ŝian alvokon pri paca agado ĉirkaŭbrakis patrinoj kaj edzinoj — esperantistinoj el ĉiuj landaj societoj: per kunvenoj dediĉitaj al la batalo por paco, per kolektado de miloj da subskriboj por la paco, kontraŭ la nuklea frenezo, per prelegoj pri la paco antaŭ plej altaj forumoj, per okupo de gvidaj postenoj en la Mondpaca Esperantista Movado.

Sekvinda ekzemplo por ni ĉiuj estas la sindona organiza laboro de Bogdana Popova — ĉu malantaŭ la skribmaŝino en la kancelario de BEA, ĉu kiel organizantino de infankongresoj, ĉu kiel membro de societa estraro. Kian aron da postsekvantinoj ŝi havas: prezidantinoj de E-societoj, aktivaj sekretarinoj, spertaj organizaĵaj aktivulinoj, kiuj subtenas ŝian opinion, ke la lingvon oni devas eklerni en plej juna aĝo.

„Animo“ de la E-agado multloke estas ĝuste senlacaĵ esperantistinoj.

Pro tio ĉiu faka sekcio ĉe BEA raportas pri aŭtoritataj, bonaj instruistinoj; pri lertaj redaktoroj de E-revuoj; pri poetinoj kaj verkistinoj, kiuj gajnas naciajn kaj internaciajn literaturajn konkursojn; pri sciencistoj kun internacia signifo; pri prelegantinoj ĉe klubaj kunvenoj, ĉe simpozioj, ĉe kongresaj forumoj; pri aktorinoj kaj kantistinoj, kiuj per la lingvo Esperanto realigas sian arton, en nia patrolando kaj eksterlande.

Entute, la apartaj nomoj de la unuaj esperantistinoj antaŭ okdek jaroj, kiujn ni facile povas elnombri, nun unuiĝis en ardan virinan koron, kiu batas kun la pulso de la nuntempa aktiva poresperanta agado.

Elkoran dankon, karaj amikinoj!

Por la prospero de nia kara lingvo Esperanto — estu paco sur la tero!

BELKA BELEVA,
prezidantino de la Virina
Komisiono ĉe BEA



MIA ESPERANTISTA VIVO

TINKA LAKOVA — veterano de la bulgara Esperanto-movado

Internacio de Proletaj Esperantistoj en Berlino (IPE).

Ankaŭ ni en Sliven fondis sekcion de BuLEA kaj komencis ricevi la revuojn „Balkana Laboristo“, „Internaciisto“, „Sur posteno“ kaj marksismajn librojn, inter ili multajn el Sovet-Unio. BuLEA eldonis ankaŭ revuon „Mejdunaroden Ezik“ (Internacia Lingvo) bulgaringve, kun celo propagandi Esperanton inter laboristoj. Mi legis la revuojn kaj gazetojn kaj distribuis ilin inter aliaj kamaradoj. Precipe multe serĉata estis „Mejdunaroden Rabselkor“ (Internacia laborista kaj kamparana korespondanto), kiu regule publikigis tradukojn de esperantistaj leteroj el fremdlando.

La gvidantoj de BuLEA Simeon Petrov, Angel Petkov — Angelo kaj Nikola Aleksiev, ofte sendis al mi kuragigajn leterojn.

Mia adreso estis publikigita en „Internaciisto“ kaj mi komencis ricevi leterojn el multaj landoj — orientaj kaj okcidentaj. Mi memoras, ke mi ricevis pli ol 30 korespondproponojn. Plej interesaj estis la leteroj el USSR. Mi respondis al ĉiuj, kiuj skribis al mi, sed konstantajn ligojn mi starigis kun sovetaj esperantistoj. Ili sendadis al mi interesajn informojn pri sia vivo, pri la atingajoj de la sovetaj lando. Ĉiun leteron mi tradukis kaj legis al kamaradoj, kiuj ne scipovis Esperanton. Miaj konsilantoj en la interkorespondado estis la pli spertaj kamaradoj. Laŭ ilia rekomendo mi informadis miajn sovetajn amikojn pri la klasbataloj en nia lando, pri la faŝistaj kruelaĵoj. Daŭre mi korespondis kun Sergej Bojev, studento en Saratov, kun Paŭlo Sumilov el Leningrado, kun Anna Hutorinska el Kievo k. a. Iuj miaj leteroj estis interesaj por la sovetaj legantoj kaj oni publikigis ilin en sovetaj gazetoj. Iun tagon mi ricevis gazeton „Komsomolskaja Pravda“ kun mia artikolo: „Kiel vivas kaj laboras la gejunuloj en Bulgario“. Mia ĝojo kaj la ĝojo de miaj kamaradoj estis senlima!

Sumilov rakontis al mi, kiel li partoprenis la Oktobran Revolution. Sergej Bojev rakontis pri la fondo de kolhozo, pri Magnitogorsk, Dneprostroj k. a. gigantoj de la jarkvino. Tiuj leteroj aperis en la bulgaringvaj ĵurnaloj „Eho“, „Pogled“, „Zarja“ k. a.

En la sama tempo mi aktivis en la komunisto partio, multobligis mane alvokojn, disvastigis ilin nokte, partoprenis sekretajn kunve-

nojn, kie ni pridiskutis la partiajn direktivojn.

Mia korespondado ne estis sekreto por la polico. Multfoje oni arestis kaj pridemandis min pri la aŭtoroj de la leteroj. Mi pravigis min, dirante, ke la esperantistoj skribas leterojn, por praktiki la lingvon, sed ne kun revoluciaj celoj. Bedaŭrinde, oni ne ĉiam kredis al mi.

Disvastigante „Mejdunaroden Rabselkor“, foje kun mi okazis granda malagrablaĵo. La fabrika kuraĥisto vidis min kaj minacis per la policianoj. Kion entrepreni? La laboristoj maltrankviligis, sed ne sciis kiel helpi al mi. Kien forkuri? Dekstre estis senelirejo, maldekstre — barilo. Iuj kamaradoj konsilis min kaj mian akompananton Lina surgrimpi la monteton. Ni estis junaj kaj ne timis krutaĵojn. Lacaj kaj malpuraj, ni atingis la supron, iomete ripozis kaj descendis en alian kvartalon de la urbo, proksime de la prizono. Tuj ni iris en la domon de konata laborista familio, rapide lavis nin kaj iris promenadi laŭ la ĉefstrato por garantii al ni alibion. Kontentaj kaj ĝojaj pro la eskapo, ni tamen baldaŭ rimarkis, ke nin sekvas policianoj. Oni denove min arestis kaj esplordemandis. Oni volis scii, kiu verkis la alvokon kontraŭ la registaro. La alvoko estis skribita per preslitteroj kaj ili konvinkigis, ke ne mi multobligis ĝin. Elirante el la policejo, mi laŭte indignis. Iu policano aŭdis mian indignon, revenigis min kaj turmentis min. Denove ili insistis, ke mi konfesu mian aŭtorecon de la alvoko. Mi denove neis.

Foje venis al mi poŝtoficejo kaj invitis min al la poŝtejestro. Li montris al mi grandan pakadon da gazetoj kaj demandas, ĉu por mi estas la pakajo? Mi respondis, ke mi ne konas la sendinton kaj rifuzis akcepti la pakadon. Tuj mi skribis al Simeon Petrov, administranto de „Mejdunaroden Rabselkor“, ke li ŝanĝu la adreson. Laŭ la novaĵ adreso la gazeto venadis senobstakle al Sliven kaj mi plu disvastigadis ĝin.

Dum la fondperiodo de BuLEA mi havis la okazon konatigi kun multaj kamaradoj el diversaj urboj, kiuj ofte gastis al mi en Sliven.

En 1933 oni elektis min en la distrikta komitato de la Laborista Partio, laŭ rekomendo de la konata partia funkciulo Săbi Dimitrov. Post la faŝista puĉo en 1934 la ricevado de gazetoj kaj libroj el USSR

Mi naskiĝis en 1907 en Sliven, en malriĉa kvarinfana familio.

Mia juneco pasis en la jaroj de faŝista teroro. La komunisto partio estis nelegala kaj multaj el ĝiaj funkciuloj estis malliberigitaj. Ni junuloj memoris, kiel vige agadis la partio dum legalaj periodoj kaj serĉis formojn por daŭrigi tiun agadon — ni aktivis en la abstinenco movado, en la societo de esperantistoj. Malgraŭ nia malriĉeco, mia patro insistis, ke mi lernu gimnazion. Ni, gimnazianoj, ofte kunvenis kaj diskutis diversajn problemojn, kase organizis marksisman-leninisman rondon.

En 1925 oni malfermis kurson de Esperanto en la knabina gimnazio. Fervore mi eklernis la lingvon kaj baldaŭ komencis interparoli, korespondi kun esperantistoj.

En 1926 mi finis la gimnazion kaj aktive partoprenis en la laboro de junkomunistaj rondoj. En la sama jaro mi ĉestis la kongreson en Varna, kiun mi partoprenis kiel delegito de la gelernantoj.

En Varna, ĉe la stacidomo, svarmis kongresanoj — junaj kaj maljunaj. Baldaŭ mi trovis la gelernantan grupon, kaj ni decidis, kion ni devas fari dum la kongreso.

Mia ĝojo estis senlima — ja mi neniam antaŭe renkontigis kun tion multe da esperantistoj, kelkiuj el fremdlando. Mi parolis kun fremduloj kaj konvinkigis, ke mi jam estas vera esperantistino.

Mi partoprenis la kunsidojn de BEA, la kunvenojn de la junuloj kaj gelernantoj. Reveninte el Varna, mi eklaboris kun granda entuziasmo en la Esperantista societo.

En 1927 estis fondita Laborista Partio. Ni junuloj komencis organizi grupojn por la progresema junularo.

En 1930 estis fondita la Laborista Esperanto-Asocio (LEA). La centro de la internacia proleta esperantistaro estis en Berlino. La bulgara LEA (BuLEA) aliĝis al la

estis neebla. Samtempe ĉi denuncis min al la polico kaj oni denove arestis min, kulpigante min, ke mi korespondas kun sovetaĵoj. Mi neis ĉion. Ne havante faktojn, oni liberigis min, sed minacis per prizono.

Mia restado en Sliven estis danĝera kaj mi transloĝiĝis en Sofio, laŭ konsilo de partiaj kamaradoj. En la ĉefurbo mi estis helpata de BuLEA-noj kaj de mia amiko Atanas Lakov, kiu ĵus finis sian stu-

donon en la universitato. En Sofio mi loĝis kaŝe, ĝis kiam miaj kamaradoj el Sliven informis min, ke la polico ne sukcesis trovi faktojn kontraŭ mi kaj la prokuroro ne kulpigas min.

Mi tamen ne plu revenis en Sliven. Atanas Lakov proponis al mi geedziĝon kaj mi konsentis. Ĉar Atanas estis konata kiel komunisto, eksredaktoro de „Balkana Laboristo“ kaj poeto-tradukisto de versaĵoj de Hristo Smirnenski, li ne po-

vis trovi laboron en Sofio. Ni forveturis al vilaĝo Sadovec kaj tie vivis en granda mizero.

Dum la Rezistado (dum la Dua Mondmilito) ni laboris kaŝe por la partio kaj por la Esperanto-movado.

Post la milito ni transloĝiĝis en Sofion kaj helpis la restarigon de BEA.

Mi retrovis iujn miajn sovetaĵajn amikojn kaj denove ekkorespondis kun ili. Unu el ili estas Sergej Bojev — nun profesoro-akademiano en Alma-Ata.

STOJAN MINĈEV — 90-JARA

Pasintjare fariĝis 90-jara la esperantisto-veterano Stojan Dimitrov Minĉev el vilaĝo Zahari Stojanov — distrikto de Targoviŝte. Homo kun variaj intereso, li ĉiam ankoraŭ estas tute vivoplena kaj agema: esperantisto, abstinenculo, vegetarano, joko-praktikanto, ŝatanto kaj plenumanto de popolaj kaj esperantaj kantoj.

Siatempe Stojan Minĉev finis nur la kvar klasojn de la elementa lernejo en sia vilaĝo. Poste li memlernis fervore, kaj dum multaj

jaroj oficis kiel kasisto-kontisto ĉe la vilaĝa kooperativo.

Esperanton li posedas perfekte kaj korespondas kun amikoj el Sovetunio, Usono, Ĉinio k. a. Stojan Minĉev estas honora membro de BEA kaj de DE de BEA en Targoviŝte.

En 1978 Stojan Minĉev verkis detalan historion de sia naskiĝloko. Tiu verko estis alte pritaksita de la specialistoj en Targoviŝte.

Jordan KALINOV

En servo de Esperanto kaj Melpomeno

Tiu ĉi intervjuo estas omaĝo al la 60-jara jubileo de nia ŝatata E-aktoro Belka Beleva. Vere, mi neniam pensis, ke tiu ĉi energiĝinta, gaja, simpatia virino jam atingis la tiel nomatan „solidan aĝon“.

Nun mi estas en la domo de la aktorino. Sur la tablo amasiĝas fotoj, sonas ŝia agrabla, varma voĉo:

— Fininte gimnazion, estante 18-jara — mi ekstudis dramatrekon en la Teatra Skolo. Poste mi laboris en la Nacia Teatro kaj en teatro „Trudov Front“ (ĝis ĝia likvido en 1964). Tiam oni invitis min instrui scenejan parolon en la Supera Instituto de Teatra Arto „Krastju Sarafov“ kaj ĝis nun mi laboras tie. Alia mia okupo estas la retoriko, kiun mi instruis en la Sofia Universitato kaj en la Supera Ekonomia Instituto „Karl Marks“.

— Kiam kaj kie vi komencis lerni Esperanton?

— Aŭtune de 1957, laŭ iniciato de la malnova esperantisto Georgi Kerelezov, en teatro „Trudov Front“ oni organizis E-kurson. Nia instruisto estis Mihail Langov. La 19-an de majo 1958 ni donis nian unuan spektaklon, kiu konsistis el kelkaj unuaktaj teatraĵoj.

Regisorino de tiu unua Esperantlingva spektaklo estis Stefka Prohaskova. Ni havis grandan sukceson kaj tute spontane ni nomis nin



Bulgara Esperanto-Teatro (BET). Dum la sekva teatra sezono ni daŭrigis nian laboron kun nova instruisto — Kiril Drajev. Roloj sekvis unu post la alia. De post tiam Esperanto eniris mian kreon kaj familian vivon kiel ĉiutaga okupo.

— Bonvolu rakonti pri via agado kiel E-aktoro kaj E-agan-tino.

— Mia laboro en BET realiĝis per plenumo de multaj roloj. Per la teatraĵo „Ĉasantoj de oficoj“ de Ivan Vazov ni partoprenis la Universalan Kongreson de Esperanto en Varsovio (1959). Poste sekvis partoprenoj en ankoraŭ 12 universitaj kongresoj, en 4 TEJO-kongresoj, 4 IFEF-kongresoj kaj 8 naciaj kongresoj, komuna agado kun la Internacia Arta Teatro. Multfoje mi kaj mia edzo Anani Anev estis membroj de jurioj, preparis artajn programojn. Okaze de la 50-a datreveno de la Septembra Kontraŭfaŝista Ribelo 1923 ni partoprenis artan programon en Budapeŝto. Poste ni turneis tra Hungario kaj GDR lige kun la 1300-jariĝo de la bulgara ŝtato. Ĉie oni akceptis nin kun ĝojo. Lige kun nia 25-jara teatra agado, dum la UK en Budapeŝto (1983) oni organizis solenan celebradon de BET. Tiam ni prezentis „Malnovmodan komedion“ de Arbuzov.

Multajn jarojn mi dediĉis al la bulgara pupteatro, kiu jam 18 jarojn regule partoprenas la pup-teatrajn festivalojn en Zagrebo. Memorinda por mi restas la spektaklo „La mistera hipopotamo“ de la Pup

teatro de Kârğali, kies tekston mi tradukis. Ĝi gajnis altajn premiojn: de profesiuloj, prilingvan kaj de la infanĵurio. . .

Certan tempon mi estis prezidantino de societo „Maksim Gorkij“ en Sofio. Nun mi aktivas en la Virina Komisiono ĉe BEA.

— Viaj planoj por la proksima estonteco?

— Jam longan tempon mi prilaboras la arkivon de la Virina Komisiono, kolektas materialojn kaj dokumentojn pri elstaraj esperantistinoj — aktivulinoj, poetinoj, verkistinoj. Kaj mi volus transdoni ĉion ĉi al la nova, juna generacio, kiu devas preni la stafeton el niaj manoj. Eble malmultaj scias, ke mi verkas libron titolitan „Teatro sen lingva bariero“. Kaj kompreneble, mi preparas min por la ku-

ranta teatra sezono, kiu estos sufiĉe malfacila, ĉar antaŭstaras jubileaj programoj — teatraj kaj artaj — en kaj ekster la lando.

— Kion donis al vi Esperanto?

— Multajn interesajn renkontigojn, neforgeseblajn kontaktojn kun alinacia publiko, eblecon ekkoni fremdajn kulturon kaj literaturon. Por mi estas feliĉo kaj fiero prezenti antaŭ sufiĉe granda internacia aŭditorio la bulgaran teatroarton, bulgarajn versaĵojn, rakontojn, popolkantojn. Vera ĝojo estas konstati, ke la fremdlanda publiko ne nur komprenas, sed ankaŭ sentas la emocian flankon de la plenumataj verkoj.

— Ĉu via multjara utila poresperanta agado ricevis publikan rekonon?

— Jes, mi kredas, ke tiel estas. Lige kun la 25-jara jubileo de BET, mi ricevis la Oran Insignon de BEA.

Al mi estas aljuĝita ankaŭ la ora insigno „Georgi Kirkov“ pro mia agado kiel lektoro de retoriko, kaj okaze de mia 60-jariĝo mi estis distingita per la Ora Signo de la Komitato pri Kulturo kaj per ordeno „Kiril kaj Metodij“ — II grado.

— Kio gvidis vin dum tiuj ĉi 30 jaroj de E-agado?

— Penso, kiu ne estas mia, sed kiun mi plene akceptas: La homoj devas interkompreniĝi pere de neŭtrala lingvo!

Intervjuis: Veneta BALEVA

KOMISIONO PRI VIRINA AGADO ĈE UEA

Dum la 71-a UK de Esperanto en Pekino estis elektita nova estraro de la Komisiono pri Virina Agado (KVA) ĉe UEA kun prezidantino Elsbeth Bormann — FRG). Membroj de tiu komisiono estas Anita Lindblom (Svedio), Erika Dobjinska (Pollando), Yukiko Isobe (Japanio), Maria Taŝeva (Bulgario) kaj Yanyutyng (Ĉinio).

Al la Komisiono pri Virina Agado ekzistas reto da kunlaborantinoj el diversaj landoj de ĉiuj kontinentoj.

Sendube, la celo de ĉiuj virinoj en la mondo, sendepende de ilia propra mondkoncepto kaj la sociordo en iliaj landoj estas: batali por konservo de la vivo por konservo de la paco, kontraŭ la milito! Tial sankta devo ankaŭ de la esperantistinoj estas agi per ĉiuj rimedoj por la paco kaj meti Esperanton serve al la pacdefendo. Des pli ke Esperanto, kiel kultura fenomeno, estas nepensebla sen la paco.

En Vankuvero, dum la 69-a UK de Esperanto, estis subskribita kontrakto pri komuna agado inter la Estraro de UEA kaj la Internacia MEM-komitato. Certe la Virina Komisiono de Internacia MEM-Komitato ankaŭ povus kunlabori kun KVA ĉe UEA. Oni povus pripensi tion.

En junio 1987 en Moskvo, Sovetunio, okazos Monda Virina Kongreso. En tiu kongreso estos reprezentantino de KVA, kie ni raportos pri nia virina Esperanto-agado.

Mi esperas, ke KVA, sub la slogano „Evoluo, Egaleco kaj Paco“ klopodos sukcese gvidi la laboron de la esperantistinoj tutmonde.

Ing. Maria TAŜEVA

NOVA SEKCIO DE BEA

La 17-an de januaro 1987 en Sofio estis fondita Sekcio de Esperantistoj-Artistoj — aktoroj, muzikistoj, pentristoj, skulptistoj k. a. La fonda konferenco partoprenis artistoj el Sofio, Plovdiv, Pernik, Stara Zagora, Ruse, Varna kaj Burgas.

La konferencon prezidis Belka Beleva. Si sciigis, ke fundamenta ĉenero de la nova sekcio, nomita Sekcio de Agantoj de la Artoj, estas la ekssekcioj de muzikagantoj, pentristoj kaj skulptistoj, kies ĝisnuna agado estas nekontentiga, kaj klarigis la celojn kaj taskojn de la nova sekcio.

Raporton pri la agado de la muzikagantoj kaj artistoj faris Maria Angelova; mallonge pri la laboro de pentristoj kaj skulptistoj informis Ivan Ĉulev. Post la raporto sekvis viglaj diskutoj pri la ĝisnuna agado kaj estis faritaj valoraj proponoj rilate la estontan laboron.

Kun atento la partoprenantoj aŭskultis la eldiron de la vic-prezidanto de la Esperanto-Akademio — prof. Stojan Ĝuĝev, kiu substrekis, ke antaŭ la nova sekcio, staras tre respondecaj taskoj.

En la nomo de CE de BEA la konferencon salutis ĝia vic-prezidanto Petâr Todorov, kiu bondeziris sukcesplenan laboron al la nova sekcio. Estis akceptitaj decidoj pri la estonta laboro de la sekcio kaj estis elektita estraro el 11 personoj kun prezidanto Ivan Ĉulev.

Draguŝko PETROV

AL PLI VASTA KULTURA HORIZONTO

Ce la sojlo de ĉiu nova jaro ni nepre devas analizi nian laboron dum la jam forpasinta jaro, klare kaj reale pritaksi niajn sukcesojn kaj malsukcesojn, por ne ripeti la samajn erarojn.

Vasta kaj multfaceta estas la laboro de BEA. Unu el la plej gravaj asociaj agadoj estas la libroeldonado. Per sia aktiva libroeldonado BEA edukas siajn membrojn en spirito de patriotismo kaj internaciismo, altigas iliajn lingvokonojn kaj kulturon.

La libroj eldonataj de BEA ne nur respegulas la vastan kaj vigan Esperanto-movadon en nia lando, ili montras ankaŭ la politikan kaj socian vivon en Bulgario. Niaj Esperantaj eldonoj senpere konatigas al la fremdlandaj esperantistoj la sukcesojn de nia lando en la sfero de scienco, ekonomio, kulturo, la aktivan strebon de nia popolo vivi en paco kaj amikeco kun la popoloj el la tuta mondo.

En sia n-ro 3/1986, nia asocia organo „Bulgara Esperantisto“ informis la legantojn pri la eldonplano de BEA por 1986. Nun, post unu jaro, ni konstatas, ke BEA ne nur plenumis sian eldonplanon, sed sukcesis eldoni eĉ pli da titoloj.

La eldonagado de BEA havas du gravajn partojn. La unua estas la bultenoj (naciaj kaj internaciaj). La dua estas la libroj, broŝuroj kaj aliaj eldonmaterialoj.

Dum 1986 regule aperadis la bultenoj „Pacaktivulo“, „Internacia ĵurnalistoj“, „Interligilo“, „Internacia Agrikultura Bulteno“, „Informilo“, „Filologo“, „Asocia Informo“ (bulgarlingve kaj Esperante), „Esperanto-informo“ (bulgarlingve) kaj „Esperanto progresas“ (bulgarlingve). Entute dum unu jaro aperis 55 numeroj de ĉiuj bultenoj, kiuj ampleksas 15 presfoliojn, t. e. ni havis suman eldonkvanton de 4790 ekzempleroj.

Dum 1986 estis represitaj Esperanto-lernolibroj por unua, dua kaj tria gradoj, lernohelpiloj kaj vortaroj en eldonkvanto de ĉirkaŭ 35 000 ekzempleroj. BEA eldonis 24 librojn kaj broŝurojn (sen la libroj, kiujn eldonis Sofia-Pres), (en eldonkvanto de entute 20 000 ekzempleroj aŭ 170 aŭtoraj presfolioj).

Aperis soci-politikaj eldonoj — „Internacia jaro de paco“ kaj „La internaciismo de Ĥristo Botev kaj nia nuntempo“ de Nikola Aleksiev, „100 demandoj kun respondoj pri la bulgara virino“ en traduko de Nikola Aleksiev, „La kooperativoj kaj la junularo“ k. a. Estis eldonitaj pluraj lernohelpiloj kiel „Didaktikaj ludoj“ de A. Fjodorov, „Esperanto-poetoj de Bulgario“ de C. Murgin, literaturaj rememoroj de elstaraj bulgaraj esperantistoj („Mia porpaca agado“ de Nikola Aleksiev, „Mia trezorejo“ de Ivan Sivarov, „Mia verda pado“ de Ĥristo Gorov), sciencaj kaj sciencpopularaj libroj, kiel „Estonto, ekologio, Esperanto“. „En la mirinda mondo de la kino“ de Donĉo Ĥitrov k. a. Aperis ankaŭ du gravaj tradukoj el la bulgara literaturo: „Homoj, antaŭen!“ de Penjo Penev kaj „Milda fifro jam eksonis. Bulgaraj popolaj amkantoj“ en traduko de Ljuba Bojaĝieva.

Pri la libroj eldonitaj de BEA, aperis pluraj pozitivaj recenzoj en diversaj Esperanto-revuoj kaj ĵurnaloj. Ĉiuj recenzintoj emfazis ilian altan lingvan nivelon kaj belaspektan teknikan arangon.

Alia elokventa pruvo pri la valoro de niaj libroj estas la vigla intereso al ili ekster nia lando. Pere de la Librokomerca Firmao „Hemus“ granda parto de niaj Esperanto-eldonoj estis eksportita en Sovetunio kaj en aliaj landoj.

Nun BEA staras antaŭ nova libroeldona jaro. Dum la jubilea 1987 aperos pluraj interesaj libroj, kiel „100 jarojn Esperanto“ (bulgarlingve) de Nikola Aleksiev, „Historio de la Esperantomovado en Bulgario, 1887-1907“ de C. Murgin, duvoluma „Esperanto-kantaro“ de D. Denĉev, kolekto de studoj sub titolo „Esperanto en la medicino“, „Beletraj eseoj“ de G. Miĥalkov k. a.

Ni esperas, ke la novaj libroj, eldonitaj de BEA, ne nur vekos la intereson de la Esperanto-legantoj en Bulgario kaj en aliaj landoj, sed plivastigos ilian kulturen horizonton.

Georgi MIĤALKOV

E-EKSPOZICIO ARANGOTA EN LA HUNGARA NACIA BIBLIOTEKO

La Hungara Nacia Biblioteko aktive partoprenos la 100-jaran jubileon de Esperanto.

En la jubilea jaro 1987 dum la Budapeŝta Printempa Festivalo, ni aranĝos Esperanto-libroekspozicion titolitan „La vojo de Esperanto-libro en Hungario“. pri la ekspozicio ni disponigas tri ĉambregojn en nia Palaco. La ekspozicio konsistas el Esperanta libro-kolekto de Károly Fajsz, kiu nombras preskaŭ 20 000 bji-

bliografiajn unuojn, inter ili pli ol 7000 libroj kaj 3000 binditaj jarkolektoj. Jam de 1982 la kolekto de Fajsz estas protektata de la ŝtato kaj funkcias sub nia aŭspicio. Kompreneble, ankaŭ niaj raraj (ekzemple antaŭesperantaj lingvoprojektoj) estos ekspoziciitaj.

Per tiu nia decido, ni deziras esprimi nian simpatian kaj estimon al la literaturo kaj movado de Esperanto.

Juhász Gyula pm.
ĉefdirektoro

Internacia literatura forumo



Solena inaŭguro de monumento de K. Kalocsay
Foto: János Antal

Omaĝe al la deka datreveno de la forpaso de Kálmán Kalocsay, de la 7-a ĝis la 9-a de novembro 1986 en Budapeŝto okazis la Kvina Internacia Literatura Forumo sub titolo: „Kolomano Kalocsay: ĉu la Danto de Esperanto?“, organizita de la Kooperativo de Literatura Foiro kaj Hungara Esperanto-Asocio.

Tiu ĉi Literatura Forumo, kiu inaŭguris la Jubilean Jaron, estis dediĉita al unu el la plej elstaraj figuroj de la Esperanto-literaturo. Kalocsay, simile al Dante en la itala literaturo, riĉigis la Esperantan literaturon, aŭ kiel diras William Auld: „Li donis al la samtempuloj kaj posteuloj perfektigitan fundamenton de tradicioj kaj modeloj.“

Kálmán Kalocsay esperantistiĝis en 1911 kaj ne estus troigo diri, ke la unua jarcento de Esperanto estas intime ligita kun lia personeco. Per siaj originalaj kaj tradukitaj verkoj — „Mondo kaj koro“, „Streĉita kordo“, „Lingvo, stilo, formo“, „Parnasa gvidlibro“, li influis la tutan Esperantan literaturon kaj ne nur formis literaturan skolon, sed lasis sekvendajn modelojn por la novaj generacioj.

La Kvina Internacia Literatura Forumo estis oficiale inaŭgurita de d-ro Árpád Máthé, vicprezidanto de Hungara Esperanto-Asocio. Poste la partoprenantojn salutis Oszkár Princz, sekretario de Hungara Esperanto-Asocio.

La enkondukan prelegon faris la konata literatura kritikisto, prezidanto de la Kooperativo de Literatura Foiro, d-ro Giorgio Silfer (Italio). En sia prelego Silfer diris, ke same kiel Dante, kiu forĝis la modernan ita-

lan lingvon, Kalocsay forĝis Esperanton. Kiel Dante, kiu estis ne nur poeto, sed ankaŭ filozofo kaj politikisto, Kalocsay estis sociaganto, kultura organizanto, konata kuracisto.

Márton Fejes, redakciano de „Hungara Vivo“, komparis la tri Esperanto-tradukojn de la ĉefverko de la hungara literaturo, la drama poemo „Tragedio de l'homo“ de Imre Madách. Kelkaj hungaraj esperantistoj tradukis fragmentojn de tiu ĉi poemo kaj unu el ili estas la fama hungara lingvisto kaj esperantisto Géza Bárczi, kiu en 1913 en revuo „La Verda Standardo“ aperigis Esperante kvin bildojn el la poemo. En 1924 Kalocsay faris plenan tradukon de „La tragedio de l'homo“, sed en 1965 li retradukis la poemon. La nova traduko estas malpli longa per 100 versoj ol la antaŭa kaj tio montras la talenton de Kalocsay majstre kaj fidele interpreti tiun ĉi klasikan verkon de la hungara literaturo.

En sia prelego Georgi Miĥalkov (Bulgario) analizis la originalajn poemojn de Kalocsay el la poemaro „Streĉita Kordo“ kaj montris la modernan, filozofian pensmanieron de Kalocsay.

La 8-an de novembro prelegis Perla Ari Martinelli (Italio) — ĉefredaktoro de revuo „Literatura Foiro“. Si faris trafilan komparon inter Dante kaj Kalocsay, kaj atentigis la aŭskultantojn pri la progresema mondkoncepto de ambaŭ poetoj, esprimita en iliaj verkoj.

D-ro Vilmos Benczik, ĉefredaktoro de „Hungara Vivo“, parolis pri la influo de la hungara kultura modelo sur la Esperanta kreado de Kalocsay. Simile al iuj el la plej elstaraj hungaraj verkistoj, M. Babits, D. Kosztolányi, A. Tóth, kiuj grave kontribuis al la evoluo de la hungara lingvo, K. Kalocsay evoluigis Esperanton kaj kreis apartan kulturen modelon en Esperanto.

En sia prelego d-rino Magda Saturova (Ĉeĥoslovakio), analizis la eseojn de Kalocsay kaj emfazis lian kontribuon al la literatura kritiko.

Herbert Mayer el Aŭstrio prelegis pri la neologismoj en la verkoj de Kalocsay kaj pri ilia rolo por la perfektigo de la poezia kaj literatura lingvo.

La prelegoj vekis grandan intereson kaj viglajn diskutojn.

Dum la Literatura Forumo estis anoncita la literatura premio „Verko de la Jaro 1985“. La premion ricevis la konata Esperanto-aŭtoro de kriminalaj kaj sciencfikciaj romanoj, la hungara verkisto István Nemere pro lia romano „Monto“, eldonita de Hungara Esperanto-Asocio.

La 9-an de novembro la partoprenantoj en la Kvina Internacia Literatura Forumo vizitis urbon Abaŭszántó, en kiu naskiĝis Kalocsay. Tie estis solene inaŭgurita monumento de Kálmán Kalocsay.

Tiu ĉi Literatura Forumo ankoraŭfoje pruvis la gravan signifon de la Esperanta literaturo kaj ĝian gvidrolon en la Esperanta kulturo.

G. ILIEV

SUR NIA VERDA TABULO

Ĉi-jare sur nia Verda Tabulo oni povas legi la nomojn de urboj Jambol kaj Ruse kaj de vilaĝo Gálábovo.

● La aktivuloj el la distrikto de Jambol varbis 249 abonantojn por „BE“ (laŭ la plano estis nur 168).

● E-societo „Verda Stelo“ en Ruse sukcesis varbi por la asocia organo 160 abonantojn.

● En urbo Gálábovo, distrikto de Stara Zagora, E-societo „Kolombo de la paco“ varbis por nia revuo 68 abonantojn.

Sincerajn dankojn kaj bondezirojn al niaj fidelaj kunlaborantoj. Al ili kaj al Ivan Dobrovski el Kjustendil, pri kiu ni skribis en n-ro 10/86 de „BE“, ni sendos donace librojn eldonitajn de BEA.

„BE“



PER PLEZURO AL PROGRESO

Marjorie Boulton. Faktoj kaj fantazioj. Progresiga legolibro. UEA, Rotterdam 1984. Desegnaĵoj de Alex

Brychta. Kovrilo de Franko Luin. Mendebla ĉe UEA. Formato: 21×15 cm.

En sia verko „Faktoj kaj fantazioj“ Marjorie Boulton observas du gravajn principojn: universaleco kaj neŭtraleco.

Kiel brita civitanino ŝi ne povis, nature, „tute senplumigi sin de sia eŭropaneco“, de siaj ligoj kun la eŭropa kulturo. Sed tamen ŝi penis verki libron „mond-rigardantan“ — ŝi ĉerpis „fabelojn kaj mirindaĵojn, homajn atingojn kaj kuriozaĵojn“ el ĉiuj kontinentoj. „Forte subtenante“ la UEA-principon pri neŭtraleco, la aŭtorino strebis eviti „netaŭgan partiecon“. Sed en la antaŭparolo ŝi prave substrekas: „Oni apenaŭ povus verki ion legindan, kio estus perfekte senopinia kaj oni ja trovas ĉi tie kelkajn principojn, kiuj espereble estas sufiĉe komunaj al bonintenculoj de diversaj ideo-

La olivbrancio simbolas pacon

En tiu lando loĝejoj kaj ripozdomoj, dissemitaj sur la apudmaraj rokaj montetoj, similas al blankaj laroj. Sub la varmaj sunradioj, en kvietaj golfetoj graciaj jaktoj kun flirtantaj diversnaciaj flagoj facile balancigas sur la ondoj. La freŝe verda mediteranea vegetaĵaro altiras la rigardon de la turistoj. Sur tiu fono pli klare reliefigas majestaj antikvaj monumentoj el blanka marmoro. Se mi aldonos, ke ĉi-tie loĝas amikoj, kiuj adoras la maron, kantojn, olivojn kaj strebas vivi en paco, ke iliaj kutimoj kaj tradicioj similas al la bulgaraj, vi kompreneble jam divenas, ke mi skribas pri nia suda najbarlando Grekio.

SURVOJA „STATISTIKO“

Vi scias, kara leganto, ke en esperantista kompanio ĉiam povas okazi gajaj kaj kuricaj situacioj. Ni havis similan okazintaĵon jam en la unuaj minutoj post transpaso de la bulgara-greka landlimo. En nia buso venis doganoficisto kaj ridetante demandis:

— Kiuj vi estas?

Ni preskaŭ hore respondis:

— Esperantistoj!

— Aha-a-a, baletistoj? Kie estaj via ĉefbaletistino. . .

Komencis respondi 80-jara docento Georgi Dimov el Varna, dank'al sia, kvankam minimuma, scio de greka lingvo — de la lernejana aĝo. . . Ne trovinte la ĉefbaletistino, la doganisto rapide finis sian kontrolon, kaj ni tuj ekveturis al Ateno, kie nin atendis la grekaj samideanoj.

Pro tio ni nur preterpase trarigardis la internacian foiran centron Tesaloniko. Survoje al Tesaloniko ni rimarkis, ke la tiea naturo multe similas al la nia. Larga kaj komforta ĉefvojo kondukis al Ateno. Ni havis la bonŝancon viziti

tiun ĉarman landon fine de la jaro, kiam oni rikoltas la mandarinojn kaj orangojn. Iuj el ni por unua fojo vidis olivarbaretojn. Estas interesa la fakto, ke en Greklando kreskas 50 specoj da olivoj — por rekta konsumado aŭ por produktado de olivoleo. Survoje ni ĝuis la montaron Olimpo kun ĝia neĝa ĉapego. Tiu montaro, kies konturoj reliefigas sur la fono de la serena ĉielo, estas ne nur la plej alta en la lando (2917 m), sed ĝi estas intime ligita kun la helena mitologio.

Survoje al Ateno ni vidis multajn pitoreskajn urbejojn, historiajn fortikaĵojn, la monumenton ĉe la montara trapasejo Termopiloj, kiu memorigas pri la heroaĵo de la soldatoj de reĝo Leonido dum la grekaj-persaj militoj (500—449 a. n. e.). En tiu lando ĉie nuntempo kunvivas kun la antikveco). La bela naturo kaj la bonaj kondiĉoj por ripozo allogas al tiu suna tero multajn turistojn. Ĉiujare Greklanden vizitas 6 milionoj da eksterlandanoj.

Tra la fenestroj de la buso, konstante ŝanĝiĝis la bildoj antaŭ niaj

okuloj. Ni estis ravitaj, ni ne povis deŝiri la rigardon de la belaj kaj allogaj pejzaĝoj. Kaj tamen samtempe ni eĉ sukcesis legi en nia turista informlibro kelkajn donitaĵojn pri Grekio.

Tiu lando havas teritorion de 131 900 km². Ĝi estas tipe mara lando kaj ĝiaj preksimume 1300 insuloj (oni loĝas konstante nur sur 170) estas dissemitaj en tri maroj: Egea, Ionia kaj Mediteranea. Grekio estas precipe montara lando kaj pro tio la loĝantaro, kiu nun nombras ĉirkaŭ 10 milionojn, loĝas plejparte en la apudmaraj regionoj. Respubliko Grekio estas industri-agrara lando. La duono de ĝia industria produktado estas koncentrita en Ateno (kun la haveno Pireo) kaj Tesaloniko. Disvolvigas la metalurgio kaj ŝipkonstruado, oni prilaboras krudan petrolon kaj oni akiras kaj prilaboras diversajn utilajn mineralojn. Kun malnovaj tradicioj estas la kemia, konserva, tabaka, teksa kaj nutraĵprodukta industrioj. Grekio estas konata kiel eksportanto de olivoleo, sekvinberoj sen semoj, de figoj, citrusfruktoj kaj de vino (plej popularaj estas la markoj „Retsina“ (rezinvino), „Demestika“, „Kambas“, „Palini“, „Santa Helena“ (blankaj) kaj la ruĝaj — „Mavrodafini“ kaj „Demestika“.

POSTSIGNOJ DE LA ANTIKVECO

Per tiuj enkondukaj vortoj mi fakte komencis rakonti pri la lando, kies belajojn ni, dudeko da bulgaraj esperantistoj, aŭtune pasintjare ĝuis en daŭro de 6 tagoj. Nia grupo estis la unua, kiu gastis al la grekaj esperantistoj laŭ la kontrakto inter Bulgara Esperantista Asocio kaj Helena Esperanto-Asocio pri regulaj bulgaraj-grekaj renkontiĝoj en ambaŭ landoj, enkadre de la balkana E-kunlaborado. De nia flanko la arangan partoprenis samideanoj el diversaj distriktoj. Mi jam menciis docenton Georgi Dimov el Varna. En nia grupo estis Cvetanka Lilova el Pravec, esperantista fami-

logioj, por ne esti atenco kontraŭ nia neŭtraleco. Se iu ofendiĝas, ĉar mi sugestas, ke paco estas preferinda al milito; ke kompato estas preferinda al krueleco; ke honesta laborado estas preferinda al krimado aŭ ekspluatado; ke inteligenta sciemo kaj larĝa klerigado estas preferindaj al filistrismo kaj obskurantismo... — pri tiaj opinioj mi ne pardonpetas".

M. Boulton verkis libron varian kaj interesan, kiu instigos al legado, respektive al lernado. La materialo estas gradigita (rilate gramatikon). La stilo estas relative simpla, sen „kap-rompaj frazkonstruaj enigmoj". Sed, bone komprenante, ke „estas tre facile resti eĉ dum jaroj iaspeca apenaŭ komencanto, rondirante en la kaĝo de sia minimumeco, kun mizere malgranda vortaro", la aŭtorino „tute intence celis pligrandigi por la postkomencantoj la vortostokon... konscie penis puŝi la legantojn ekster la poŝvortaran palisaron". Si celas ekzercigi pri frazkonstruado, por kreskigi la kapablon legi, skribi kaj paroli, sisteme enkondukas utilajn esprimrimedojn por montri, ke en Esperanto jam ekzistas multaj fakterminoj.

„Faktoj kaj fantazioj" estas verkita por „progresantoj", ĝi povus esti tre utila al gvidantoj de progresigaj kursoj. Sed — ankaŭ al izolitaj aŭtodidaktaj. La libro estas dividita en 52 ĉapitrojn, do ĉiu ĉapitro prezentas ĉiusemajnan taskon por privata lernoaro.

La aŭtorino rilatis tre serioze al sia tasko: ŝi pasigis multajn horojn „en ses grandaj bibliotekoj, serĉante materialojn, esplorante kelkcent librojn kaj gazetojn, el kvar jarcentoj kaj en kvar lingvoj". Tial ŝia legolibro por progresantoj fakte povus evidentiĝi alloga legaĵo ankaŭ por spertaj esperantistoj.

Kaj konklude — por ni bulgaroj „Faktoj kaj fantazioj" prezentas apartan intereson. La dediĉo sur la frontpaĝo tekstas jene:

„Al amikino radie klerigema, rapide komprenema, refortige kuragiga — RAJNA KONSTANTINOVA, kiu mortis la 15-an de aŭgusto 1983. Mi volis honori vin vivantan; nun mi dediĉas la verkon al via kara memoro."

Lidia RAEVA

Iio Emil kaj Velurina Ĉirpanski el Asenovgrad, Dimităr Ĥristov el Jambol, Cvetka Miteva, Dimităr Petrov kaj Nevjana Krăsteva el Sofio k. a.

La afablaj dommastroj proponis al ni sufiĉe interesan vojaĝplanon. Ni sukcesis trarigardi la vidindaĵojn de Ateno taj speciale ĝui la Akropolon, la Nacian Arkeologian Muzeon, la malnovan kvartalon Plaka kun ĝiaj multnombraj tavernoj, kie nokte sonas „buzuki", oni dancas „sirtaki" kaj trinkas „Retsina". Per aŭtobuso laŭ la marbordo ni veturis ĝis la plej suda punkto de duoninsulo Atiko — la urbo Sunion. Trapasante la Korintan kanalon nia grupo atingis duoninsulon Peloponezo, kie ni havis la plezuron konatiĝi kun la historio de la famaj antikvaj urboj Korinto, Mikenao kaj Epidaŭro. Ĉiam nin akompanis grupo da simpatiaj grekaj samideanoj ĉe-kaŭpe kun la prezidantino de HEA — s-rino Maria Pontika. Mi ne povas ne menci ankaŭ la nomojn de Kostas Zaharakis, Sofia Moslu, Elefteria Vojaĝaki, Zoi Maragundaki, Matilda Ilipulu, Steljos Zafiriu.

Ni estis ravitaj pri la arto de antikva Grekio, kies plej konata simbolo estas


LA AKROPOLO DE ATENO. Oni scias, ke la vorto „akropolo" signifas la pinto (akro) kaj la plej defendita parto de la antikva greka urbo (polis). Ordinare tie la helenoj konstruis la ĉeftemplojn kaj la publikajn konstruaĵojn. La Atena Akropolo datigas de la periodo de Periklo, kiam sub la gvidado de la talenta skulptisto Fidio oni kreis klasikajn arkitekturajn monumentojn kun harmoniaj proporcioj kaj elegantaj formoj. Ĝis niaj tagoj konserviĝis nur kvar konstruaĵoj faritaj inter 448—400 a.n.e.): la templo de la virga diino Palasa — la Partenono, la Propileo (la impona pordego ĉe la enirejo al la Akropolo), la Templo de Atena Niki nomata ankaŭ „Senflugila Venko", Ereĥteo (ionia templo).

En SUNION ni vidis la restaĵojn de la templo de la mara dio Pozidono. Sur unu el la konservigitaj kolonoj la vizitanto povas vidi la subskribon de la fama angla poeto Bajrono (Byron), kiu partoprenis la batalon de la greka popolo kontraŭ la otomana jugo kaj trovis tie sian morton.

En Grekio, same kiel en Bulgario, ofte okazas tertremoj, ĉar la tuta Balkana Duoninsulo estas simila regiono. Terura tertremo en 521 a. n. e. detruis la urbojn Mikenao kaj Epidaŭro. Ofte oni ligas Mikenon kun la geedzaj paroj Agamemnono-Klitemnestra kaj Menelao-Helena el la senmorta verko „Iliado" de Homero. Oni supozas, ke Mikenao datigas de ĉirkaŭ la III jarmilo a.n.e. Pro la intimaj kontaktoj inter Mikenao kaj insulo Kreto disfloris la fama kreta-mikena kulturo.

Eble ne ĉiuj scias, ke en EPIDAŬRO troviĝas la antikvaj sanktejoj de Asklepio (dio de la medicino ĉe Helenoj), Afrodita kaj Artemisa, stadiono k. a. Sed certe multaj aŭdis pri la fama teatro, kiu eĉ nun havas la plej bonan akustikon en la mondo. Por ni la vizito de tiu loko restos neforgesebla por ĉiam. Starante en la lastaj plej supraj vicoj de la teatro, ni ĝuis la belan panoramon. Kaj subite ni aŭdis soni „En la mondon venis nova sento...". Ni ne kredis al niaj oreloj — sur Epidaŭro oni kantis la himnon de Esperanto! Sed baldaŭ la mistero klarigis: la grupeto da grekaj esperantistinoj, kiuj restis malsupre, donacis al ni tiun fortan travivaĵon. Post kiam ni revenis al ili, Zoi Maragundaki tralegis al ni kortuŝan leteron, skribitan de la vidvino de la angla aktoro kaj reĝisoro Leslie Rostrom al la fama greka aktorino Katina Paksinu:

„Ni ĉiam esperis, ke iam ni vizitos Grekion — la lulilon de la teatroarto kaj spektos la tragediojn en Epidaŭro. Kaj dum ĉiu ĉi tempo ni laboris senĉese por sanktigi sur la scenejo la pozicion, kiu apar-



Sur la fono de la Atina Akropolo
Foto: la aŭtorino

tenas al la antikvaj tragedioj. Inter la tragedioj, kiujn reĝisoris Leslie estis Medea, Elektra kaj Antigona. Nun permesu al mi peti de vi ion strangan. Mia edzo mortis antaŭ ol plenumi sian multjaran revon viziti Grekion kaj Epidaŭron. Lia cindro estas enterigita sub la scenejo de la Manĉestra Teatro, al kiu li tiom multe oferis. Sed mi konservis iom da lia cindro kaj dum ĉiuj ĉi sep jaroj post lia perejo mi esperis, ke mi alportos en Grekion kaj disjetos lian polvon laŭ la vento sur Epidaŭro. Kun la pasado de la tempo tiu ĉi espero neniigis.

Pro tio, vi pardonos min, ke mi petas de vi plenumi tiun mision. La ujo kun la cindro estas eta, malpeza. La antikva teatro ĉiam estis hela stelo de mia edzo kaj se mi helpus al li atingi Epidaŭron, mi konscius, ke mi kontribuis por la plenumiĝo de lia lasta deziro".

Komprenable Katina Paksinu priorgis la aferon kaj baldaŭ la cindro de la reĝisoro estis disblovita laŭ la vento super Epidaŭro.

(Daŭrigota)
Maria JANKOVA

KION INDIKIS LA SKALO DE HOMECO

Politburoo de la Centra Komitato de Bulgara Komunista Partio kaj la Ministra Konsilantaro de Popola Respubliko Bulgario pridiskutis kaj akceptis Decidon por likvido de la postsekvoj de la tertremo, okazinta la 7-an de decembro 1986.

En la Decido oni emfazas, ke la tertremo kun epicentro en urbo Strajica, distrikto de Veliko Tŕrnovo, estas la plej forta kaj detrua de post kelkaj jardekoj. Ĝi kaŭzis grandajn materialajn damaĝojn en la distriktoj de Veliko Tŕrnovo kaj Tŕrgoviŝte. Pereis homoj, estas dekoj da vunditaj homoj. Centoj da civitanoj restis sen loĝejo. Ĉesis la produktadago de industriaj entreprenoj, brutbredejoj, de centoj da objektoj por servoj, komerco kaj publika nutrado. Estas ĉesigitaj la okupoj en multaj lernejoj. Ne funkcias vico da hospitaloj, poliklinikoj kaj infanvartejoj.

Bulgara Telegrafo Agentejo — 16-an de decembro 1986)

TUTPOPOLA HELPO

En daŭro de unu monato, post la 7-a de decembro, la aparatoj registris ĉirkaŭ 1300 terskvojn en la regiono de Strajica kaj Popovo (distrikto de Tŕrgoviŝte). Kvin el ili estis pli fortaj kaj komplikigis la situacion. . .

Tiu natura plago estas ne nur elprovo de la homa eltenemo, sed ankaŭ serioza kontrolo laŭ la skalo de homeco. Jam sekvontage per la amaskomunikiloj entreprenaj kolektivoj kaj apartaj personoj komencis informiĝi, al kiu adreso oni povas sendi libervolan helpon por la homoj, trafitaj de la plago, malgraŭ ke ĉe similaj situacioj la ŝtato garantias sian subtenon al la loĝantaro. Oni fondis Nacian Publikan Fonduson al la Nacia Konsilantaro de Patrolanda Fronto, kies celo estas helpi la loĝantaron de la trafitaj regionoj. En la komenco de la kuranta jaro en la fonduson estis deponitaj pli ol 36 milionoj da levoj. La kolektita mono servas por pagi la luon de homoj loĝigitaj en privataj domoj, por transportaksoj de lernejoj kaj laboristoj, por kompensoj al la suferintoj, por konstruado kaj por aĉe-

to de materialoj por renovigo de la loĝlokoj — domoj, sanprotektaj kaj administraj konstruaĵoj, infangardenoj, lernejoj ktp.

Multaj homoj el la tuta lando disponigis siajn loĝejojn al la restintaj sen rifuĝejo, pluraj familioj decidis akcepti infanojn kaj zorgi pri ili kiel pri siaj propraj infanoj. Vico da entreprenoj disponigis siajn ripozdomojn kiel provizorajn loĝejojn. Al la regionoj de Strajica kaj Popovo ekveturis vagonaroj kun nutraĵoj, vestoj, konstrumaterialoj. Al la tragedio de la lokaj homoj kunsentas la tuta bulgara popolo. La grandega malfeliĉo unuigas la fortojn de ĉiuj.

Al tiu tutpopola helpo ankaŭ

LA BULGARAJ ESPERANTISTOJ DONIS SIAN KONTRIBUON

● Gis nun (la mezo de januaro — n. a.) ili deponis je la konto de la Nacia Publika Fonduso pli ol 127 000 levojn. Helpis esperantistoj el Vidin, Veliko Tŕrnovo, Gabrovo, Plovdiv, Pazargik, Pleven, Ruse, Razgrad, Kubrat, Sofio, Cepelare, Haskovo, Tŕrgoviŝte k.a.

En la redakcio venis multaj leteroj kun informoj pri la esperantista helpo.

● La komsomolanoj el CE de BEA oferis sumon de 200 levoj. El la ĉefurba estraro de BEA oni sciigis pri kelkaj faktoj: E-societo „Samanta Smith“ ĉe la Centra Instituto por Preparo de Medicinistaj Kadroj estis kolektitaj 100 levojn. La veterano-esperantisto Nikola Aleksiev donacis 250 levojn. Karamfilka Adamova disponigis al CE de BEA por vendado 13 objektojn el sia ekspozicio de popolstilaĵ pupoj. La mono estos deponita en la klason po rekonslruaj laboroj en la trafitaj regionoj.

● Nia kunlaboranto Cvjatko Todorov el societo „Vekiĝo“ — Sumen skribis: „En la arkivo de nia societo estas konservata dokumento, de kiu ni eksciis, ke ĝiaj tiamaj membroj kolektis monon por la suferintoj pro katastrofa tertremo en 1928, en Suda Bulgario. Kaj nun, fidelaj al la humanaj ideoj de la iniciatinto de la Internacia Lingvo d-ro Zamenhof kaj al sia homa devo, la posteuloj de la tiamaj esperantistoj estis inter la unuaj, kiuj helpis al la loĝantaro en la regiono de Strajica. Nia kontribuo estas modesta, sed elkora.“

Verŝajne ni ne menciis ĉiujn, kiuj helpis en tiu malfacila situacio, sed la homoj el Strajica, Popovo kaj aliaj loĝlokoj sincere dankas al ili.

En la unuaj semajnoj post la tertremo la bulgaraj amaskomunikiloj regule informis pri la tutpopola helpo. Gis nun tiuj sciigoj ne ĉesas, sed jam pli multe oni parolas pri plenumo de la programo pri restarigo de la normala vivo en la regionoj de la tertremo. Ĝi skuis ne nur la teron, sed ankaŭ niajn animojn kaj konsciencojn. Ĉu ili eltenis? Laŭ mi — jes!

Maria BOJAĜIEVA

ESPERANTO EN TELEVIDO — JAM TRADICIO

Kvankam pasis nur unu jaro kaj duono depost la unua apero de Esperanto en la regula programo de Bulgara Televido (BT), ni jam povas paroli pri bona kunlaboro inter BT kaj BEA.

La laŭvica elsendo kun E-partopreno okazis la 17-an de januaro laŭ la unua televid-programo. Domastro de la amuza televid-konkurso „Minuto multas“ ĉifoje estis la Internacia Esperanto-Kursejo. Tio estis ankaŭ la laŭvica krea elmontriĝo de la sekretario de Sofia Esperanto-Domo pri Kulturo „Maksim Gorkij“ Bojidar Aleksiev, laŭ kies iniciato estis realigitaj ĉiuj ĝisnunaj televid-elsendoj pri Esperanto.

Por la sukceso de la aranĝo multe kontribuis ankaŭ la ĝenerala direktoro de IEK inĝ. Angel Todorov, la tuta IEK-kolektivo kaj la redaktoro de revuo „Paco“ Veneta Baleva.

La junulara klubejo „Astoria“, de kie oni elsendis, estis ornamita de la dommastroj per tre interesaj kaj atentokaptaj poresperantaj propagand-materialoj, kiuj bone videblis sur la televidekranoj. Trafa estis ankaŭ la klariga propaganda teksto pri Esperanto, kiun legis la gvidanta aktoro dum la elsendo. Tiel Esperanto ankoraŭfoje eniris la domojn kaj la pensojn de la multnombra televida spektantaro kaj pruvis, ke ĝi estas interesa kaj utila.

Oni donis la parolon al la ĝenerala direktoro de IEK inĝ. A. Todorov, kiu salutis la spektantojn kaj la televid-skipon kaj informis la publikon pri la 100-jara jubileo de Esperanto. Poste li disdonis la premiojn al la gajnintoj. Specialan premion „Malpli komplika lernolibro“ ricevis ankaŭ la gvidanta aktoro P. Vuĉkov.

La multnombraj pozitivaj resonoj pri „Minuto multas“ kun nia partopreno pruvas, ke la elsendo provokis grandan intereson. Jen bona vojo por informi la vastan publikon pri Esperanto kiel lingvo kaj movado.

V. DIMITROVA

Béla Berceli

(1905—1986)



Forpasis granda figuro de la Esperanto-movado en Hungario. Béla Berceli agadis dum jardekoj sur la esperantista tereno kaj lasis videblajn spurojn. Kun lia nomo estas ligitaj gravaj momentoj el la historio de Esperanto-movado en Hungario antaŭ kaj post la Dua Mondmilito. En la postmilita periodo, li ligis sian agadon kun la intereso de la monda Esperanto-movado, kie li lasis bonegajn, impresojn.

Béla Berceli jam en tre juna aĝo fariĝis esperantisto kune kun sia pli aĝa frato Vilmos Bleier, kiu havas ekskluzivajn meritojn pri la eldonado de la fama „Literatura Mondo“, redaktata de Kalocsay kaj Baghy. Béla (ŝanĝinta intence sian familian nomon je Berceli) revivigis la revuon „Literatura Mondo“ post la milito.

Li devis vivi eksterleĝe pro la persekutoj far nazioj kontraŭ judoj. Lia agado en la laborista fako de Hungara Esperanto-Movado estas rimarkinda. Krome li agadis kiel sindikata kaj partia funkciulo kaj fariĝis sperta gvidanto. Ne hazarde dum li estis ĝenerala sekretario de la unuiginta Esperanto-movado en Hungario (1965—1974), ĝi notis seriozajn sukcesojn. Kiel sciata, la Hungara Konsilio de Sindikatoj estas la tegmenta organizo de HEA kaj morale-materiale subtenas ĝin. Béla Berceli estis konata en la sindikataj medioj, oni alte taksis liajn kapablojn kaj dufoje aljuĝis al li sian plej altan distingon. Dum certa tempo Berceli servis en la armeo kiel politika oficiro kaj atingis altan rangon de ĝeneralo-majoro. Eble tiu militista praktiko influis lin esti interne-organizita per-

sono, kun perspektiva rigardo al la estonteco. Lia alta marksisma-leninisma kulturo ankaŭ ege helpis lin en lia socia, respektive esperantista agado.

Mi havas personajn impresojn pri Berceli de nia komuna agado en la internacia Esperanto-movado. Ni samtempe estis komitatanoj de UEA dum kelkaj elekt-periodoj. En la medioj de UEA-komitato Berceli elstaris kiel unu el la plej aktivaj komitatanoj, guntaj la estimon de ĉiuj. Liaj saĝaj, trankvile argumentitaj proponoj estis subtenataj de la plimulto. Li sincere strebis al stabiligo de UEA kaj faris multon, kiel prezidanto de LKK, por la brila, plej amase vizitita ĝis tiam Universala Kongreso en Budapeŝto (1966). Serioza, atentema en siaj rilatoj kun la ceteraj samideanoj, ne tre parolema, ĉiam trankvila kaj konvinka, li agadis senbrue, tamen rezultodone. Jen kial li gajnis simpatiojn en ĉiuj medioj.

Speciale mi deziras emfazi la meritojn de Berceli en la organizado de kunlaboro inter Esperanto-organizaĵoj en la socialismaj landoj. Li unua proponis novan formon de kunlaborado — la tiel nomitaj pli poste ĉiujaraj konsultiĝoj de reprezentantoj de Esperanto-organizaĵoj el la socialismaj landoj.

La Unua kaj la Dua konsultiĝoj okazis en Hungario. Berceli zorgis krei la necesajn kondiĉojn por ilia trankvila kaj sukcesa laboro. Ni ĉiuj estis dankaj al li pro la zorgoj.

Tiu formo de konsultiĝoj tiel bone manifestiĝis, ke ankaŭ aliaj Esperanto-asocioj prenis sur sin la taskon organizi ilin. Ĉiuj sentis bezonon de unuecigo de niaj klopodoj por plifortigo de niaj landaj kaj internaciaj kontaktoj kaj agoj.

Kiam ĉi-jare oni organizos la 20-an laŭvican konsultiĝon, oni certe omaĝos la meritojn de Berceli — la iniciatinto kaj unua organizanto de la konsultiĝoj.

En la tagordo de la konsultiĝoj ĉiam estis punkto pri la agado de MEM. Tio ege kontribuis al pliiintenso de nia tiudirekta agado. Kaj jen ŝajna paradokso: la altranga oficiro de la hungara armeo ĝeneralo Béla Berceli aperis en la rolo de tre alloga organizanto de la esperantista pacbatalo. Li ĉiam insistis turnis la atenton de ni ĉiuj pri la neceso de kontaktoj kaj kunlaboro de MEM kun la Monda Packonsilio, kun la landaj packomitatoj, kun ĉiuj pacmovadoj kaj organizaĵoj.

Berceli estis ĉiam elegante vestita, tre milda al siaj amikoj, delikate zorgema rilate la ceterajn samideanojn, agema, inteligenta kaj takta. Oni nur povas bedaŭri, ke dum la lasta jardeko li mankis en la rondo de Esperanto-gvidantoj. Sed li ne perdis intereson al la movado. Dum la solena ceremonio okaze de la 40-jara jubileo de HEA en 1985 ni denove renkontiĝis kaj mi kun granda ĝojo ĉeestis lian distingon per la ora insigno de Hungara Sindikata Konsilio. Bedaŭrinde, tiu estis nia lasta renkontiĝo. . .

Kliniĝon antaŭ la hela memoro de Béla Berceli

Nikola ALEKSIEV

VIGLA RESONO

La bulgara E-movado aktive respondis al la „Apelo de Hiroŝima kaj Nagasaki por totala malpermeso kaj elimino de nukleaj armiloj“. Laŭ iniciato de la Bulgara MEM-Komitato multaj esperantistoj el la tuta lando partoprenis la kampanjon por kolektado de subskriboj sub la Apelo. Kelkloke tiu nobla agado estis farita kunlabore kun la Urbaj kaj Distrikta Komitatoj por Defendo de la Paco, kiel ekz. en Drjanovo kaj Haskovo.

Dum 1986 oni kolektis entute 147 867 subskribojn, kiuj estis transdonitaj al la Internacia Komitato por Akcelo de Subskriboj en Tokio (Japanio). Aparte distingigis esperantistoj el la distriktoj de Haskovo (70 244 subskriboj), Stara Zagora (18 498), Veliko Tŕrnovo (14 768), Pazarĝik (13 952), Gabrovo (6 747) k. a. Plej aktivaj individue estis Bojil Dragankov, pli ol 80-jara — el Kotel, Sliven-distrikto (2043), Petko Arnaudov el Pazarĝik (pli ol 2000), Hristina Nikolova

el Pazarĝik (pli ol 1500), Sonja Tiĥova el Gabrovo 719) k. a.

Plej bone laboris la esperantistoj el Drjanovo (5768 subskriboj), Polski Trŕmbeŝ (5682 subskriboj) k. a.

Inter la miloj da subskriboj menciindas tiuj de Elena Lagadinova — membro de la Ŝtata Soveto de PR Bulgario, parlamentano, prezidantino de la Komitato de la Movado de Bulgaraj Virinoj, de Nikola Aleksiev — merita kulturaganto, honora prezidanto de MEM, de Hristo Gorov — prezidanto de CE de BEA, de elstaraj funkciuloj de la Vjetnama Pacdefenda Esperantista Asocio k. a.

Vjetnama Pacdefenda Esperantista Asocio transdonis 148 subskribojn pere de la delegitaro de MEM, kiu en junio 1986 partoprenis la celebren de la 30-jara jubileo de la Asocio.

La kampanjo por kolektado de subskriboj sub la „Apelo de Hiroŝima kaj Nagasaki“ daŭras plu!

Evgeni GEORGIEV

NOVA GENERACIO EN SLOVAKIO

La Esperanto-movado en ĉiuj siaj evoluetaĵoj estas ligita kun la junularo. Tion oni observas ankaŭ en Slovakio.

La plej nova periodo en la historio de Slovaka Esperanto-movado komenciĝas en 1969. En tiu jaro (post paŭzo komenciĝinta en la kvindekaj jaroj), estis fondita, en hotelo „Esperanto“ en Pribilina, Asocio de Esperantistoj en Slovaka Socialisma Respubliko (nun Slovaka Esperanto-Asocio). Post komencaj problemoj la laboro disvolviĝis. Estis organizita la vivo en Esperanto-klubo, okazis diversaj Esperanto-aranĝoj, renkontiĝoj, kongresoj, ktp. Kreskis la internacia kunlaboro, plinombriĝis la asociaj membroj, la aranĝojn partoprenis multe da junaj homoj.

En tia situacio aperis bezono aparte zorgi ankaŭ pri la junularo, doni al la junularo spacon por pli intensa laboro — kun metodoj kaj stilo taŭgaj por ili. Por la celo estis organizita en 1977 en Bystré la I Konferenco de Junulara Sekcio. La unua komitato ne plenumis sufiĉe bone siajn taskojn.

En 1979 samloke okazis la II Konferenco. Okazis ŝanĝoj en la sekcia komitato. Prezidanto fariĝis Stano Marček. Tiu ĉi periodo (inkluzivante ankaŭ la III Konferencon de nia sekcio en Dolní Kubín, ĝis la IV Konferenco en Svít en 1983), povas esti el vidpunkto de ekstera aktiveco taksata plej pozitive. Okazis kelkaj specialaj junularaj aranĝoj, okazis Someraj Esperanto-Lernejoj kaj komenciĝis lernejo por junaj funkciuloj. Ĝin finis la plimulto de nuntempaj funkciuloj de nia sekcio. En tiu periodo la sekcio akceptis sian nunan nomon — Junaj Esperantistoj en Slovakio (JES), kaj akceptis sian regularon, kiu kun minimumaj ŝanĝoj validas ĝis nun. JES fariĝis ankaŭ landa sekcio de TEJO dum la IJK en Rauma (Finnlando, 1980).

JES estis bone reprezentata en diversaj eksterlandaj seminarioj kaj konferencoj, ĉefe en Hungario kaj Pollando, sed la laboro en TEJO ĝis nun estas nekontentiga kaj la sekcio estis formala membro de TEJO.

La nova generacio de funkciuloj komencis labori en la komitato de JES post la IV Konferenco. Tiam JES komencis organizi regulajn turistajn aranĝojn: mont-grimpojn sur Monto de l'Rego en la Malaltaj Tatroj, kiu pro organizaj kaŭzoj transformiĝis al JERAT (Junulara Esperanto-Renkontigo en Altaj Tatroj). Sed la karaktero de la aranĝo konserviĝis — ĝi estas turista naturprotektita junulara aranĝo. JES estis ankaŭ iniciatinto de Kulturaĵ Esperanto-Tagoj en Poprad, kiuj estas konkursa-prezenta aranĝo pri la kultura vivo de esperantistoj en nia lando.

Depost la konferenco de Svít komenciĝis preparo por ŝanĝoj en la interna organiza strukturo de JES — antaŭ ĉio por kreo de pli malaltaj ŝtupoj en la organiza JES-hierarkio. Estis kreitaj regionaj komitatoj de JES. La celo estas, ke en ĉiu E-klubo estu kreita almenaŭ junulara celo, kiu estu en rekta kontakto kun la regiona komitato de JES. Sed pro diversaj kialoj, en tiu periodo la Centra Komitato kaj anaro iom pliforiĝis unu de alia. Ĉefan kaŭzon ni vidas en vere malbona informado. Tio, memkompreneble, malbone influas la tutan agadon de JES. Al tiu problemo donis grandan atenton ankaŭ la lasta konferenco de JES en Ostré (1985).

Alia negativa afero en JES estas ĝenerale malbona lingvonivelo de la membroj. Tio serioze malhelpas la evoluon de viglaj internaciaj kontaktoj.

Apartan atenton JES turnas al la kontaktoj kun Ĉeĥa Esperanto-Junularo (ĈEJ). En tiu sfero ni povas vidi pozitivajn tendencojn kaj rezultojn, sed multo ankaŭ ĉi-tie estas farenda.

Antaŭ JES en ĝia plua laboro staras multaj taskoj. La plej gravaj el ili trovis lokon en la laborplano de la Sekcio. Jen kelkaj el ili:

● finkonstrui la organizan strukturon de la Sekcio por certigi kontaktojn inter la Centra Komitato de JES ĝis la unuopaj membroj;

● zorgi pri plialtigo de la lingvonivelo de la JES-membroj;

● dediĉi regule atenton al la junpioniraj Esperanto-grupoj en Slovakio, metodike gvidi ilin kaj direkti ilian agadon;

● okupiĝi pri la edukado de novaj funkciuloj de la Sekcio;

● organizi junularajn Esperanto-aranĝojn;

● certigi senĉesan alfluon de aktualaj informoj en la Sekcio, plialtigi la nivelon de la propaganda laboro;

● krei kondiĉojn por bona reprezentado de JES en TEJO;

● efektivigi kunlaboron kun SZM (La landa junulara organizo);

● plifirmigi la kontaktojn kaj kunlaboron kun ceteraj junularaj sekcioj, apartan atenton turni al la rilatoj kun ĈEJ.

Do, niaj planoj estas grandaj. Ili postulas multan tempon kaj klopodojn fare de ĉiu juna esperantisto en Slovakio. Sed por realigi ilin ni bezonas ankaŭ la helpon de niaj frataj junularaj sekcioj, kunlaboron kun junularaj E-organizoj en aliaj landoj.

Milan ONDRUŠ,
prezidanto de JES

INTERESA RENKONTIGO

La 30-an de novembro 1986 en la Junulara Domo — Burgas, okazis III Distrikta Junulara Renkontigo de lernantoj kaj membroj de E-Societoj kaj lernejanaj E-klubo, studentaj Esperanton. En la salono kunvenis 207 esperantistoj el la tuta distrikto, gvidataj de iliaj instruistoj kaj kursgvidantoj. En 1986 en la distrikta junulara grupo membris kaj pagis sian membrokotizon 380 gejunuloj kaj gejunuloj.

La Renkontigo estis organizita de la Estraro de la distrikta junulara grupo kaj de DE de BEA — Burgas.

Vanja Miĥajlova — respondeculino pri junulara agado ĉe DE de BEA, malfermis la Renkontigon kaj donis la parolon al N. Petrov — vicprezidanto de DE, por saluti la partoprenantojn. Per varmaj vortoj li salutis la gejunulojn kaj iliajn gvidantojn, M. Stojanova parolis pri la lokaj kaj internaciaj aranĝoj de la distrikta junulara grupo dum 1987 — tendaroj, E-lernejoj kaj internaciaj laborbrigadoj.

La ĉeestantoj aplaudis la artplenumojn de la grupoj el Faklernejo pri Agrikultura Meĥanizo — urbo Karnobat, kun gvidantino Janka Ilieva, kaj el la meza politeknika lernejo „Georgi Dimitrov“ — urbo Pomorie, kun gvidantino Smaragda Janeva.

Sekvis dancoj, kvizo kaj amuzaj konkursoj, kiujn partoprenis teamoj el vilaĝo Zvezdec kaj el urboj Burgas kaj Karnobat.

Vanja MIĤAJLOVA

PRI LA STATUTO DE LA LERNEJANAJ KLUBOJ

LA PROPONO:

Tre atente mi pristudis la artikolon de Cvetka Miteva en „BE“ — n-ro 8/86 „Pri la nova strukturo de BEJ“. En la artikolo oni legas, ke lernejanaj grupoj kaj kluboj devas pagi membrokotizon al la loka teritoria Esperanto-societo.

Miaj observoj kaj la praktiko konvinkis min, ke ĉiuj lernejanaj grupoj kaj kluboj en grandaj urboj, kie estas profesia instruista E-societo devas pagi la kotizon kaj esti gvidataj de la koncerna instruista societo. Eĉ pli: krom la estraro de la instruista societo devas esti ankaŭ komuna estraro de la lernejanaj kluboj, kie ĉiu el ili havu sian reprezentanton (eble la kluba prezidanto). Laŭ mi tio ĉi estos vera esperantista demokratio.

Jen miaj konsideroj: En Ruse estas pli ol 5–6 lernejanaj Esperanto-kluboj (ĉe la kluboj por internacia amikeco) kun propraj patronnomoj: „Kolombo de la amikeco“ ĉe lernejo „Hristo Smirnenski“, „Verda Kolombo“ ĉe lernejo „Vasil Kolarov“, „Fenestro al la mondo“ ĉe lernejo „Pejo Javorov“ k. a., tamen pro manko de konstanta komuna gvidado kaj kontrolo, pro manko de profesia instruista societo kun lernejana estraro ĉe la societo kaj pro tio, ke la lernejanaj kluboj estas dissemiĝintaj en tri urbaj teritoriaj societoj — „Libero“, „Kulturo“ kaj „Verda Stelo“, la lernejanaj kluboj post kelke da tempo estos vere mortaj!...

Honore al la 100-jariĝo de Esperanto BEA kaj ĝia Instruista Sekcio devas urĝe ordigi la aferon. La vivo mem, la realeco diktas, ke la statuto ne estas dogmaro!

Jordan KALINOV — Ruse

LA RESPONDO:

Estimata samideano Kalinov,
Via propono estas vere tre bona. Vero estas ankaŭ, ke la Statuto ne estas dogmo, sed tamen ni ne povas ŝanĝi ĝin ĝis la sekvonta kongreso. Ne en ĉiuj grandaj urboj estas instruistaj societoj, en kiuj povus membri la gelnantoj. Tamen el la instrukcioj al la statuto estas fiksita, ke la Instruista Sekcio zorgas pri la funkciado de la lernejanaj Esperanto-grupoj kaj kluboj. Ankaŭ la Junulara Sekcio ĉe BEA kontrolas, pere de siaj distrikta respondeculoj, la agadon de la Esperanto-kluboj en la lernejoj. Dependas de tio, kiel bone aktivadas la kluboj kaj grupoj mem kaj kiom aktivaj estas la societoj, en kiuj ili membras. Aktivigu viajn junajn esperantistojn, starigu al ili la taskon helpi al la lernejanaj kaj organizu pli ofte renkontiĝojn aŭ aliajn interesajn aranĝojn por interesi ilin, kaj la plimulto el ili certe restos en niaj vicoj.

Cvetka MITEVA,
prezidantino de la Junulara
Sekcio ĉe BEA

RIĈENHAVA AGADO

La 20-an de novembro 1986 okazigis sian jarkunvenon la lernejana E-klubo „Koljo Tenev“ en mezlernejo „Vasil Levski“ — v. Tenevo, distrikto de Jambol. En ĝi membras 45 gejunuloj.

La raporto donis konkretan bildon pri la unujara riĉenhava kaj varia agado de la klubo: estis organizitaj ekskursoj al proksimaj lokoj, ekskursoj tra la lando; vizito de la Plovdiva Specimen-Foiro, estis prezentitaj E-programoj (pere de la lerneja kaj vilaĝa radiodisaŭdiga servo pri Zamenhof, pri la 75-jariĝo de la E-movado en la distrikto, pri la Jaro de la Paco. Interese pasis la renkontiĝo kun nia samvilagano Krásztju Tenev — ekspartizano kaj aktiva batalanto kontraŭ la faŝismo kaj kapitalismo, honora membro de la vilaĝa E-societo „Progreso“ kaj frato de unu el la unuaj esperantistoj en la distrikto — la senmorta par-

tizano kaj patrono de la klubo — Koljo Tenev. Por propagandi la Internacian Lingvon, ni regule preparas E-ekspoziciojn kaj murgazetojn en la lernejo.

Post tralego de la raporto estis faritaj eldiroj kaj proponoj pri la plua agado de la klubo kaj estis akceptita la jarplano. Fine estis elektita la nova 6-membra estraro de la klubo.

En la nomo de DE de BEA la junajn esperantistojn salutis ĝia vicprezidanto Dimităr Hristov.

Stojanka LEVKOVA

LA SATOKUPO DE VASILKA

Vasilka Vaseva el Kjustendil estas lernantino en la 11-a klaso. Antaŭ du jaroj ŝi komencis lerni Esperanton en la lernejo. Samtempe la junulino ekserĉis korespondantojn, aperigante sian adreson en revuo „Esperanto“. Ĝis nun ŝi ricevis pli ol 40 korespondpropojn. Nun Vasilka havas 28 gekorespondantojn el 14 landoj: Irano, Pollando, Brazilo, Argentino, Usono, Ĉinio, Madagaskaro, Hungario, Vjetnamio, Jugoslavio, Sovetunio, Ĉeĥoslovakio, Tajvano, Britio.

La adresojn de tiuj, al kiuj ŝi ne sukcesis respondi, Vasilka proponis al siaj gekonatoj-esperantistoj, kiuj deziris korespondi. Ŝi estas membro de la loka E-societo, regule vizitadas la urban E-klubojn kaj kunportas tie siajn leterojn kaj poŝtkartojn. La korespondado de la juna esperantistino estas vigla kaj interesa.

Nun en la klubeja montrofenestro estas aranĝita interesa ekspozicio el ŝiaj leteroj.

A. BERBEROVA

NI GRATULAS

Adriana Kalojanova — aktivulino de Bulgara Esperanto-Junularo kaj Hektor Alòs i Font — komitatano de TEJO kaj prezidanto de Kataluna Esperanto-Junularo jam estas familio! Ilia edziĝfesto okazis la 27-an de decembro 1986 en urbo Kjustendil (Bulgario). Bulgara Esperanto-Junularo gratulas la novan Esperanto-familion!

JUBILEA POSTMARKO



En PR Bulgario estas emisiita speciala poŝtmarko dediĉita al la 100-jara jubileo de Esperanto.

Objekto: portreto de Zamenhof kaj du tergloboj kun enplektita en ili la emblemo pri la centjariĝo de Esperanto.

Pentristo: Dončo Karapetrov.

La marko estas presita sur blanka, 100%-e celuloza gumita papero. Eldonkvanto: 1 100 000 ekz.

Virina poesia paĝo

Asen JOSIFOV

FELIĈAN FESTOTAGON!

Karega verda amikino,
Al vi feliĉan belan Feston
Internacian de l' Virino!
Jen havu koran versateston
pri bondeziroj-ĉi sen finol

Vi ĉiam estu sana, gaja,
en plua jarojplur' prospera;
eksentu vin junece maja,
feliĉa, vigla, bonesperal

La kosmo pluekzistu bela,
kaj plenumiĝu pacaj revoj;
vivvojo brilu ĝoja, hela,
kaj fruktodonu noblaj devoj!

Penka PAPAZOVA

BULGARINO

Monumenton de la bulgarino
la tempo konstruis en niaj koroj. . .
Monumenton de la laboremaj
virinaj manoj,
de la sindona kaj malavara patrino korol

Virino! La Parcoj vin tiel antaŭdestinis:
frumatene la aŭronon renkonti,
kiel la tero forta esti —
mastrino de la vivo kaj la beleco. . .
La panon sur la tablo vi dispecigas,
la vivon en kantoj kaj brodaĵoj
vi senmortigas!

FLORO DE L'AMIKECO

Homoj, etendu viajn manojn por amikeco,
ja amikeco simbolas la pacon!
Homoj, faru la distancojn inter ni
vojetoj al la koro,
por ke estu paco, estu vivo
en mondo nia! . . .

Nerimarkeble malfermiĝas florburĝonoj —
tiel en niaj koroj la floro de l'paco ekfloras,
kaj kreskas nia forta indigno
kontraŭ la minaco de nuklea milito.
Ni ne volas sonĝi suferojn kaj bombojn. . .
Ni batalas por paca ĉielo. . .
Homoj de nia maltrankvila planedo,
gardu la floron de amikeco kaj paco!

Lilia NIKOLOVA

LA PLEJ MALFACILA EPOKO

En nepardonebla amplitudo
la planedo maltrankvile vibras:
ĉu post la katastrofa milittrudo
la mondo estos dezerto nigra,
ĉu al la komunista estonto
konstruos la homaro ĉiopova
unudirektan, supreniran ponton —
triumfe realigita strofo?

Unu nehome armita epoko;
du tendaroj kaj nur du variantoj,
ĉien insistas la pacama voko:
la vivvenko — planeda kuniranto!

LA ROZOJ PLORAS

Per siaj falantaj folioj
en larmojn transformiĝis la rozoj!
Ekploris la belega momento
pro senespera metamorfozo.

Mi enradikigas la triston
en versaĵon, en entuziasmon,
en mian nobligantan persiston
kaj en devon al la roza ĉarmo.



Zamenhofaj festoj

La bulgaraj esperantistoj ĉiujare solene notas la naskiĝdatrevenon de d-ro L. L. Zamenhof — 15-an de decembro. Ĉi-sube ni donas lokon al korespondaĵoj el la E-societoj pri la Zamenhofaj solenaĵoj.

„BE“

PAZARĜIK. La 14-an de decembro 1986 en la urbo okazis la tradicia Zamenhofa solenaĵo, sed laŭ netradicia maniero.

Ĝi komenciĝis sur strato „Esperanto“ kiel mitingo kaj finiĝis en la E-klubejo. Partoprenis ne nur reprezentantoj de la Esperanto-societoj el la distrikto, sed ankaŭ reprezentanto de CE de BEA, nome Violin Oljanov, Ĉeestis multaj geurbanoj kaj oficialaj reprezentantoj de multaj ŝtataj kaj sociaj institucioj en la distrikto.

Dum la solenaĵo dediĉita al la naskiĝtago de d-ro L. L. Zamenhof kaj al la 100-jariĝo de Esperanto, sur strato „Esperanto“ estis inaŭgurita la unua en nia lando bareliefo de d-ro L. L. Zamenhof. La bareliefo estas senrekompensa faro de nia samurbano — la skulptisto Ivan Minekov.

Pri Zamenhof kaj pri la 100-jariĝo de Esperanto dum la mitingo parolis la prezidanto de DE de BEA Petko Arnaudov kaj la reprezentanto de CE de BEA Violin Oljanov, kaj en la klubejo — la prezidanto de Esperanto-societo „Radio“ — d-ro Ivan Cunĉev. Belartan programon plenumis la E-ĥoro de instruistinoj en Pazargik kun direktanto Angel Cenov.

Por paraziĝikanoj tiu solenaĵo fakte notis la komencon de la 100-jara jubileo de Esperanto, kaj por la urbo la bareliefo estas nova grava kultura akiraĵo.

P. ARNAUDOV

PLEVEN. La 15-an de decembro 1986 la esperantistaro en la urbo solene celebris la 127-an naskiĝtagon de d-ro L. L. Zamenhof. Gastoj de la solenaĵo estis la direktoro de la ekonomia entrepreno „Globus“ ĉe BEA ing. Dimitar Popov, la prezidantino de E-societo „Trumpetisto“ en urbo Levski Stanka Toŝeva kaj la veterano-esperantisto Marin Tomĉev.

Pri la vivo kaj agado de Zamenhof parolis Vâlka Dobrev — prezidantino de DE de BEA. Si informis, ke Esperanto estas divastigita en pli ol 100 landoj, ĉiujare okazas pli ol 200 oficialaj internaciaj aranĝoj de esperantistoj, milionoj da homoj interkonrespondas en Esperanto, la lingvaj baroj ruiniĝas. La parolantino emfazis la signifon de la Esperanto-movado en la pachtalo.

La vespero finiĝis per riĉenhava artprogramo.

Jorĵeta KAMENOPOLSKA

RUSE. La laŭvica semajna renkontiĝo de esperantistoj-aktivuloj en la urba Esperanto-klubejo en Ruse la 16-an de decembro 1986 estis dediĉita al la 127-a naskiĝtago de d-ro Zamenhof. Artan programon en Esperanto plenumis la artgrupo ĉe lernejo „Vasil Kolarov“ kaj deklamantoj el lernejo „Otec Paisij“. Raporton pri d-ro Zamenhof faris la aktivulo de la urba Esperanto-societo „Liberio“ Georgi Venkov.

Poste oni anoncis du agrablajn novaĵojn: fondo de Esperanto-societo en urbo Vjatovo en la distrikto de Ruse kaj de Esperanto-klubo ĉe la popola legejo „Zahari Stojanov“ en Ruse. La legejo havos Esperantan fakon kun esperantlingvaj kaj priesperantaj libroj kaj gazetoj.

Jordan KALINOV

VELIKO TĀRNOVO. Impone celebris la 127-an datrevenon de la naskiĝo de d-ro Zamenhof la esperantistaro en Veliko Tarnovo.

La urbaj Esperanto-societoj „D-ro Vârban Genĉev“, „Lumo“ kaj „Fluganta Letero“ aranĝis en la ejo de la Bulgara Ruĝa Kruco solenan kunvenon, kiun ĉeestis

multaj samideanoj, lernantoj kaj kursanoj, studentaj la lingvon, amikoj de Esperanto.

La solenaĵon malfermis Sonja Senj — membro de la Distrikta Estraro de BEA. Kun granda atento la ĉeestantoj aŭskultis raporton pri la vivo kaj la faro de nia kara Majstro, kiun prezentis Jordanka Bâĉvarova — estrarano de societo „Lumo“. Post la raporto parolis la esperantisto-veterano Hristo Dolĉinkov. Li akcentis la rolon de la Esperanto-movado en la batalo por paco kaj interkompreniĝo de la terloĝantoj.

Sekvis amuza programo. La publiko ĝuis la versaĵojn „Ho, mia kor!“ de d-ro Zamenhof, arte plenumita de la juna Esperanto-aktivulino Petja Sirjanova. Grandan intereson ĉe la ĉeestantoj vekis la kvizo, kies demandoj speciale por la okazo preparis la konata esperantista agentino Olga Cankova. Tiuj, kiuj respondis plej precize kaj elĉerpe, ricevis diversajn esperantaĵojn.

Leonid SENJ

VELINGRAD. Laŭ iniciato de E-societo „Stojo Kalpazanov“ la 19-an de decembro 1986 okazis solena kunveno, dediĉita al la naskiĝdatreveno de d-ro Zamenhof kaj al la 100-jariĝo de Esperanto.

La kunvenon malfermis Boris Gaĝanov — prezidanto de la societo, kiu parolis pri la agado de la societaro dum 1986. Poste la vicprezidanto Boris Marinov legis raporton pri la vivo kaj agado de d-ro Zamenhof — aŭtoro de la internacia lingvo Esperanto.

La kunvenon ĉeestis multaj geesperantistoj kaj amikoj de Esperanto. Inter ili estis Nikola Godev — la plej aĝa esperantisto en la regiono de Ĉepino. Laŭ lia iniciato la 10-an de januaro 1958 13 entuziasmoplenaj geesperantistoj fondis societon „Stojo Kalpazanov“.

La aranĝon partoprenis ankaŭ aliaj malnovaj esperantistoj.

La riĉan muzikprogramon per multaj esperantaj kaj bulgaraj kantoj partoprenis la urba kvarteto ĉe la Sindikata Domo de Kulturo. Knabinoj kantis sub la gvido de s-ino Zaĥova, kaj deklamis versaĵojn.

Vasil BRIĈEV

RENKONTIGO EN KAŬNAS

SOVETUNIO. Meze de decembro multaj esperantistoj el Litovio, Latvio, Estonio kaj aliaj respublikoj de Sovetunio renkontiĝas en Kaŭnas. Tio jam fariĝis tradicio. La 12-an-14-an de decembro 1986 venis en la malnovan litovan urbon gastoj el pli ol 20 loĝlokoj de la lando — Tallinn, Parnu, Viljandi (Estonio), Riga, Daugavpils, Liepaja (Latvio), Minsk, Vitebsk (Belarusio) Lvov (Ukrainio), Novgorod, Sovetsk (Rusio) kaj multaj urboj kaj urbetoj de Litovio.

La programo de la aranĝo estis enhavoriĉa kaj interesa, dank' al zorgoj de samideanoj el Kaŭnas: Povilas Jegorovas, Erikas Laiconas k. a.

La feston solene malfermis la vicprezidanto de Litova Filio de la Asocio de Sovietiaj Esperantistoj, advokato P. Jegorovas. Sekvis salutparoloj de la gastoj. Jan Ojalo el Tallinn, tuj post la malferma ceremonio prezentis ampleksan prelegon „Originala literaturo en Esperanto“. Li dividis la prelegon je du partoj — „Esperanta literaturo ĝenerale“ kaj „Esperantopoezio“. Aparte interese li rakontis pri la mondfama estona E-poetino Hilda Drezen. Kaŭnasano Antanina Baltruŝiene prelegis pri temo „Tolstoj kaj Esperanto“. Estona gasto Eduard Raus, ilustrante per lumbildoj, rakontis pri malproksima Hindio. Samtage okazis komuna fotado de partoprenantoj en la renkontiĝo, demonstrado de lumbildoj pri antaŭe okazintaj E-aranĝoj kaj renkontiĝoj, amatora koncerto, amika vespero. La duan tagon okazis diskutoj, intersaĝo de sperto, esperantista forumo.

Kiel aparta programero estis organizita ekskurso laŭ la Zamenhofaj kaj ligitaj kun Esperanto lokoj en Kaŭnas. Zamenhof vizitadis la urbon, ĉar Kaŭnas estis naskiĝloko de lia edzino Klara Zilbernik. La domo de familio Zilbernik travivinta du militojn, staras ĝis nun.

Stasys GAIDAMAVIČIUS

„FLUGANTA LETERO“ JUBILEAS

Fine de decembro pasintjare/13/geesperantistoj-poŝtistoj — membro de societo „Fluganta Letero“ ĉe la Distrikta Direkcio de la Komunikado en Veliko Târnovo, celebris la 20-an datrevenon de ĝia fondo. Krom multaj gastoj, gesamideanoj el la aliaj du urbaj societoj, „Lumo“ kaj „D-ro Vârban Genčev“, la solenajon ĉeestis la sekretario de la Distrikta Estraro de BEA Leonid Senj.

Pri la vojo trairita de la societo — de ĝia fondiĝo ĝis nun, raporton faris Stančo Drebov, unu el la fondintoj kaj fama longjara ĝia prezidanto. Kun kontenteco la veterano notis, ke dum la lastaj kelke da jaroj la societo signife stabiligis, vigligis sian agadon, plimultigis ĝiaj membroj.

La kunvenon salutis Leonid Senj. Li substrekkis la entuziasman laboron de la societanoj ĉe-kape kun Mladenka Petrova — prezidantino kaj Krăstinka Vasileva — sekretariino, kaj ilian aktivadon en la organiza vivo de la urba kaj distrikta E-organizoj. La reprezentanto de DE de BEA aparte emfazis la konstantan penadon de la societanoj bonege ellerni Esperanton, pri kio elokvente parolas la ĉiujaraj kursoj por perfektigo, speciale organizataj en la societo. Fine li bondeziris al la jubileuloj pluajn sukcesojn en la Esperanto-agado kaj en ilia profesia laboro.

L. S.

EFIKA KUNLABORADO

La oficejo por turisma reklamo ĉe la Bulgara Asocio pri Feriado kaj Turismo eldonas prospektojn, broŝurojn, afiŝojn, diapozitivojn, filmojn k. a. materialojn. Ĝi ĉiujare eldonas ankaŭ koloran kalendaron pri eventoj kaj arandojn en la lando, kiuj prezentas intereson ankaŭ por eksterlandaj turistoj. Tiu kalendaro aperas en 50 000 ekz., en franca, germana, angla kaj rusa lingvoj.

Depost tri jaroj, dank' al la ĝustatempa liverado de informoj, la eldonantoj publikigas la titolojn kaj la datojn de signifaj Esperanto-arandoj, kiuj okazas en Bulgario.

La kalendaro por 1987 invitas al jenaj Esperanto-arandoj: Turismaj tagoj en Sofio kun festo de montodomo „Esperanto“; konkurso de kajtoj; 421-kilometra remado sur Danubo; Turisma marŝo en monto Pirin; ŝakturniro; somera universitato k. a.

Tiu ĉi senpaga reklamo de Esperanto-arandoj estas tre utila por nia movado. Ĝi vaste informas en multaj landoj pri niaj arandoj kaj aktivado kaj kontribuas por altiĝo de la movada prestiĝo.

Senpagan ekzempleron de la kalendaro en unu el la kvar menciitaj lingvoj petu de la vojaĝoficejoj de „Balkanturist“, funkciantaj en ĉiuj eŭropaj ĉefurboj aŭ, eventuale, pere de la bulgaraj ambasadejoj.

VARIIGU VIAN PROGRAMON

La estraroj de E-societoj, kluboj, grupoj kaj rondoj zorgas prepari varian kaj interesan programon por siaj kunvenoj. Ni povas helpi tiurilate, disponigante prelegeton, prospektojn, diapozitivojn k. a. esperantaĵojn, por ke vi organizu arandon pri temo „Bulgario — paradizo por turistoj kaj esperantistoj“.

Bonvolu informi nin, kiaj estas viaj eblecoj prisimila kunlaborado. Skribu al „ESPERANTOTUR“, senprofita turisma servo, P.K. 45, BG, 1090-Sofio, Bulgario.

N. NIKOLOV

PRI LA UNUA BULGARA ESPERANTISTO

Okaze de la Festo de Juristoj kaj de la bulgara konstitucio E-klubo „D-ro Miloslav Bogdanov“ ĉe la Kulturdomo de Juristoj en Sofio, kune kun Sofia Distrikta kaj Urba E-estraroj organizis la 4-an de decembro ĉi-jare solenan kunvenon dediĉitan al la unua bulgara esperantisto Miloslav Bogdanov, doktoro pri juraj sciencoj. La kunveno okazis en la Festa Halo de la Justicpalaco en Sofio. Partoprenis esperantistoj-juristoj kaj amikoj de Esperanto en Sofio, Bankja, Vidin, Pernik, Pleven, Blagoevgrad. Paroladon pri la iniciatinto de Esperanto faris Stefka Cenkova el CE de BEA, kaj pri d-ro M. Bogdanov — Boris Atanasov, prezidanto de la Sekcio de Juristoj-Esperantistoj ĉe BEA. Ili parolis pri la unuaj paŝoj de la E-movado en Bulgario kaj mondscale. Nadja Haĝigoeva el Pleven recitis sian versajon pri M. Bogdanov, la aktorino Angelina Sotirova el la Supera Teatra Instituto en Sofio recitis versajon de Asen Josifov pri la unua bulgara esperantisto. Junpioniroj el Bojuriŝte plenumis mallongan artprogramon. La kantistino Karamfilka Adamova kantis bulgarajn popolkantojn.

B. ATANASOV

FRUKTA VESPERO — JAM TRIAN FOJONI

La 18-an kaj 19-an de oktobro 1986 E-renkontiĝo „Frukta Vespero“ en Kjustendil okazis jam trian fojon. La programo pli malpli restas la sama. Ĉiujare la partoprenantoj vizitas la artgalerion „Vladimir Dimitrov — la Majstro“, kie oni rakontas al ili pri la vivo kaj la verkaro de tiu fama — modesta kaj genia, bulgara pentristo. Sekvas oficiala kunveno, dediĉita al la paco, kaj arta programo esperantlingva. La programon partoprenas E-grupo „Verdaj Steletoj“. Sekvas komuna vespermanĝo kun gajaj programeroj — deklamaĵoj, serĉaj prezentoj, dancoj.

Dum la tago oni organizas viziton en du-tri najbaraj vilaĝoj. En 1983 en vilaĝo Dragoviŝtica nin bonvenigis la vilaĝestro kaj la prezintato de la loka agrikultura laborkooperativo. Al ni estis prezentita filmo pri la funkciado de la mastromo kun tre interesaj informoj. Ja en nia distrikto troviĝas la plej granda ĉerizĝardeno en Eŭropo kaj unu el la plej grandaj kaj interesaj fruktĝardenoj sur Balkana Duoninsulo. Poste ni vizitis la domon de Stojan Guglev, nomita „Domo de la Homano“. En ĉiu ĉambro estas aranĝitaj multnombraj leteroj el la tuta mondo, inkluzive de Indira Gandhi, sur la muroj kaj sur la plafonoj estas skribitaj opinioj de grandaj personecoj pri la paco. La dommastro ne loĝas en tiu ĉi domo kaj ĝi fariĝis muzeo.

Sekvis vizito de pomĝardeno, kie la ĉeestantoj havis eblecon helpi al la kooperativanoj. La gastoj aĉetis fruktojn de la speciale funkcianta por la okazo magazeno.

La lasta programero estas vizito de la domo en vilaĝo Ŝiskovci, kie dum pluraj jaroj loĝis Vladimir Dimitrov — la Majstro.

Por variigi la ĉi-jaran programon, DE de BEA decidis inkludi viziton de la naskiĝloko de la elstara antifaŝisto Dimităr Kaljaŝki — vilaĝon Jilenci, kiu troviĝas 8 km okcidente de Kjustendil. La grupo tagmanĝos en la loka restoracio. Oni havos eblecon aĉeti fruktojn.

Kaj fine — jen nia plendo: jam du-aŭ trifoje en siaj jarplanoj CE de VEU fiksas la saman daton por „Frukta Vespero“ (Kjustendil) kaj „Kaŝтана Vespero“ (Petrici)! Ni esperas, ke tio ne ripetigis estonte, ĉar la organizantoj de ambaŭ arandoj dezirus ĝui pli amasan partoprenon.

Adriana BERBEROVA



DEZIRAS KORESPONDI

BRAZILIO

Kleber Halfeld — R. Antonio Carlos, 7339-Juiz de Fora-Minas — 36025 — kun ĉi pri ĉi.

ĈEĤOSLOVAKIO

Jan Libra (37-jara) — Bobrovskeho 1, ĈS-67801 Blansko — pri turismo, muziko kaj filatelo; kolektas PM kaj BK.

ĈINIO

Li XI King (24-jara) — Sichuan, Pan-Kuang — Unua mezlernejo — pri fotografio, gazetoj, libroj de fotografio.

GDR

Gerhard Harnbogen (63-jara instruisto) — Am Schönblick 11/31, 5300 Weimar — pri tranoktejo ĉe Nigra Maro en aŭgusto 1987 por du personoj.

Urba grupo de la Demokratia Virina Asocio, Leipzig, serĉas kontaktojn kun unuopaj virinoj kaj virinaj grupoj en socialismaj landoj por interŝanĝo de pensoj, spertoj, malgrandaj donacoj kaj eventuala reciproka gastigado. Bv. skribi al: Ino Kolbe, Dessauer Str. 35a, 7021, Leipzig, GDR.

FINNLANDO

Seppo Pietilainen (23-jara fraŭlo) — Joukahaisentie 3/F 38 SF-06/SO Porvoo 15 — pri radio-elsendoj kaj interŝanĝo de esperantaĵoj.

HUNGARIO

Simon Lajos (16-jara lernanto) — Tét. Fő ut. 289100 Gvör-Sopron Hegve — kun bulgaraj gejunuloj pri historio, filozofio, literaturo.

Henrietta Kačai (11-jara lernantino) — Mezőhegyes, Sziklai Sándor Lakótelep 3/B IIe/7a 5820 — kun samagaj gelernantoj; kolektas BK.

Serĉas korespondantojn precipe bulgarajn por siaj 6—15 jaraj gelernantoj.

Soós Karlo (grafikisto-instruisto) — Petőfi ut. 96, Baglyas Hetközi Diákotthon, 3100 Salgotarjan; Halasz Róza (instruitino) — Kíssomlyó ut. 2; Leánykollégium; 3100 Salgotarjan;

Horvath Mihályné (instruitino) — Nagybátonyi Általános Iskola, 3070 Bátorfyerénye.

KUBO

Ignacio Fuentes Perez — Calle 16 1710 Quivicán, Habana — pri interŝanĝo de E-libroj, broŝuroj, vortaroj, gazetoj kaj magazinoj.

José Maria Rodríguez Felgueres (32-jara, poŝtoficeisto) — Arda Fdez. Zadreda n-ro 102 — 12°—C, 33207 Gijón (Asturias) — pri naturo, filmoj, muziko, komputiloj; kol. BK kaj PM.

RUMANIO

Szőke László — Tihadar 5/13, 4150 Odorheiu — Seciuesc — pri elektrotekniko, ornitologio.

ENHAVO

II Memorlokoj de nevelkanta gloro (Donĉo Ĥitrov)

1 Ni interligu la manojn por jubilea kunlaborado (D-ro Humphrey Tonkin)

2 La bulgaraj esperantistinoj vigle agadas (Belka Beleva)

3 Niaj veteranoj:

Mia esperantista vivo (Tinka Lakova)

Stojan Minĉev — 90-jara (Jordan Kalinov)

4 En servo de Esperanto kaj Melpomeno (Veneta Baleva)

6 Al pli vasta kultura horizonto (Georgi Miĥalkov)

7 Internacia literatura forumo (G. Iliev)

8 Ni recenzas:

Per plezuro al progreso (Lidia Raeva)

9 La olivbranĉo simbolas pacon (Maria Jan-kova)

10 Kion indikis la skalo de homeco (Maria Bojaĝieva)

11 In memoriam:

Béla Berceli (Nikola Aleksiev)

12 Juna esperantisto

14 Virina poezia paĝo

15 Zamenhofaj festoj

16 Enlanda movado

III Deziras korespondi

IV Virinaj ridetoj (Aforismoj pri virinoj)

Sur la unua kovrilpaĝo:
Mastrino de la ŝpinfako

Foto: Kirilka Savova

ADRESSANGO

S-ino Maria Pontika — prezidantino de Helena Esperanto-Asocio, ŝanĝis sian adreson. Sia nova adreso estas:

Agiu Meletiu 83
t. 112-51
Ateno, Greklando

NI KONDOLENCAS

La 10-an de januaro 1987 forpasis la 76-jara veterano de societo „Fajrero“ en Radomir Kostadin Aleksandrov Topalov (naskita la 6-an de aprilo 1911). Li estis membro de la societo ekde 1936 kaj ĝia estrarano depost 1966.

Ni kliniĝas antaŭ lia hela memoro.

Societo „Fajrero“

Cefredaktoro: Donĉo ĤITROV

Redaktoroj: Haim LEVI (vicĉefredaktoro), Maria JANKOVA

Respondeca sekretario: Lidia RAEVA

Redakta komitato: Marin BACEV, Mariana ELENOVA, Dimităr HAĜIEV, Krăstju KARUCIN, Georgi MIĤALKOV, Venelin MITEV, prof. d-ro Kiril POPOV

Teknika aranĝo: Ljubomir LAZAROV

Korektisto: Jordan ĈALJOVSKI

Administranto: Asen JOSIFOV

Revuo „Bulgara Esperantisto“ — fondita en 1919, distingita per ordeno „Kiril kaj Metodij“ — I grado. Eldonkvanto 6500 ekz.

Adreso de la redakcio:

„BULGARA ESPERANTISTO“

Bul. Ĥristo Botev 97

1303 Sofio, Bulgario

P. K. 66

1 000 Sofio

Ŝtata presejo „Georgi Dimitrov“, bul. Lenin 117



Aforismoj

Ne estas eble vivi kun tiuj fivirinoj (komprenu: virinoj ĝenerale). Tamen tute ne eblas vivi sen ili.

Aristofano. „Lizistrata“.

La virta edzino komandas sian edzon, cleante al li
Publij Sir. „Sentenco“

Malfideleco, via nomo estas virino!
Shakespeare. „Hamleto“.

Ne estas io pli malĝoja ol la vivo de virinoj, kiuj nur scipovis esti belaj.

Fontenelle. „Pensoj kaj aforismoj“

Bela virino plaĉas al la okuloj, bona virino plaĉas al la koro. La unua estas juvelo, la alia — trezoro.

Napoleono I. „Maksimoj kaj pensoj“

Virino estas kiel ĉielo super la tero, ŝi estas sub kaj sur, ĉie ĉirkaŭe. Ni naskiĝas en ŝi. Ni vivas dank' al ŝi. Ni estas ĉirkaŭitaj de ŝi. Ni spiras ŝin, ŝi estas atmosfero, elemento de nia koro.

Michelet. „La virino“

Ho, virino, vi estas kreaĵo ne nur de Dio, sed ankaŭ kreaĵo de la viroj. Ili ĉiam donacas al vi la belecon de siaj koroj. Per via unua duono vi estas virino, per la alia — imagopovo.

R. Tagore. „Donaco de la amatino“

Ne povas esti inda per estimo tiu viro, kiu rilatas al sia edzino kiel al objekto por hejma uzado.

G. Dimitrov

Sen la aktiva kaj konscia partopreno de virinoj en la regado de la lando, en la soci-politika, ekonomia kaj kultura vivo ne povas esti vera demokratio, vera progreso kaj popola bonstato.

G. Dimitrov

Viro kaj virino estas tiuj du notoj, sen kiuj la kordoj de la homa animo ne donas ĝustan kaj plenan akordon.

G. Mazzini

Oni devas pli multe timi amon de virino ol malamon de viro. Tio estas veneno des pli danĝera, ĉar ĝi estas agrabla.

Sokrato

La oron oni elprovas per fajro, la virinon — per oro, la viron — per la virino.

Seneko

La virinoj estis kreitaj por dresi la virojn.

Voltero

La viro posedas forton kaj majestecon; gracio kaj beleco estas propraj nur al la alia sekso.

Buffon

Virino estas la plej potenca estaĵo en la mondo — de ŝi dependas direkti la viron tien, kien lin ne direktus eĉ Dio.

H. Ihsen

La virino neniam povas esti senarmigita per komplimentoj, la viro — ĉiam.

O. Wilde

La brakoj de bona virino, ĉirkaŭ la kolo de viro, estas savzono, kiun la sorto jetas al li el la ĉielo.

Jerome C. Jerome

Virino estas pli dolĉa ol la vivo kaj pli amara ol la morto.

Salomono

Oni devas scipovi ofte obei al virino, por rajti de tempo al tempo ordoni al ŝi.

Hugo

Virinoj inspiras nin por grandaj faroj, sed ĉiam malhelpas al ni plenumi ilin.

O. Wilde



Virina atuto en pacdefendo

Karikaturo: REME

